


EL POPOLA ĈINIO

中國報


5

1974





En la sezono de riĉa rikolto (penetraĵo de kampano)



Intervidiĝo de Prezidanto Maŭ Zedong kun Prezidanto K.D. Kaunda

Varman bonvenon al Prezidanto K. D. Kaunda

Je la 25-a de februaro Houari Boumediene, prezidanto de la Konsilantaro de Revolucio kaj prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Demokratia Popola Respubliko de Alĝerio, atingis Pekinon por fari oficialan viziton al Ĉinio laŭ invito de Dong Bivu, aganta prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, kaj Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. Kun sincereco kaj amikeco la ĉina popolo varme bonvenigis la honorindajn alĝeriajn gastojn venintajn de la bordo de Mediteraneo.

En vespero de la 25-a de februaro, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis en Ĝongnanhaj kun Prezidanto Houari Boumediene kaj liaj akompanantoj en la vizito kaj vaste interŝanĝis kun ili opiniojn pri la problemoj interesantaj ambaŭ flankojn en kora kaj amika atmosfero.

En la longtempa batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo la popoloj de Ĉinio kaj Alĝerio ĉiam simpatias kaj subtenas unu la alian. La vizito de Prezidanto Boumediene al Ĉinio estas grava afero en la amikeca historio de ambaŭ landoj. Ni profunde konvinkiĝis, ke la vizito pliigos la disvolviĝon de la amikaj rilatoj de kunlaborado inter Ĉinio kaj Alĝerio kaj la amikecon inter la du popoloj.

Pompe floras la socialismaj literaturo kaj arto

PRINTEMPE de la kuranta jaro, en la ĝardeno de socialismaj literaturo kaj arto de nia lando prosperas cent floroj kun diversaj koloroj. La profesiaj kaj amatoraj artaj trupoj de diversaj lokoj prezentis multajn programerojn, kiuj spegulas la batalan vivon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en la socialisma epoko. Sur la ekrano aperis novaj koloraj rakontaj filmoj.

La revoluciaj modelaj teatraĵoj, kiuj signas gravan sukceson akiritan en la Granda Proleta Kultura Revolucio de nia lando, kiaj la pekinoperoj *Ruĝa Signal-lanterno*, *Ŝagiabang*, *La Haveno*, *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, *Surpriza Atako de la Blanktigna Regimento*, *Spirito de Longgiang*, *Bataloj sur Ebenaĵo*, *Rododendra Monto*, estas pli vaste prezentataj en la tuta lando. Ankaŭ multaj lokaj operoj

adaptitaj laŭ tiuj estas prezentataj en diversaj lokoj.

Puŝate de la revoluciaj modelaj teatraĵoj, la profesiaj kaj amatoraj literaturaj kaj artaj laborantoj de niaj diversaj lokoj verkis multajn novajn kantodancojn, muzikaĵojn, teatraĵojn, *ĉjuji*-ojn k.a. Inter tiuj programeroj prezentataj en Pekino troviĝas *pingĝju*-opero *Butiko Hiang-jang*, kiu spegulas gejunulojn sur la komerca fronto varme amantajn sian laboron; unuakta moderna dramo *Ĝaŭgiaŝan*, kiu prikantas sanan kreskon de intelektaj gejunuloj en kamparo; hebej-a *bangzi*-opero *Printempa Hirundo de Junling-brigado*, kiu priskribas kamparan kuracistinon tutanime servantan al la popolo; kaj marioneta opero *Ruĝaj Floroj sur Stepo*, kiu rakontas, ke geknaboj sentime protektas la kolektivon posedadon. Inter multaj artaj programeroj prezentataj

Danco Gardistoj sur la Landlimo prezentata de la Kantodanca Ensemblo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio



en Ŝanhajo sin trovas la sublima grand-tipa revolucia simfonio kun nacia stilo *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, kiu estas nove verkita de la Ŝanhaja Simfonia Orkestro, kaj multaj aliaj malgrandaj sed bonaj programeroj. La artaj trupoj de Tiangin prezentis la revoluciajn modelajn teatraĵojn, la modernan dramon *Floranta Juneco*, hebej-ajn *bangzi*-operojn *Pramejo* kaj *Komunika Stacio de Montregiono*, pingĝju-operon *Insulaj Milicianoj* k.a. Krom prezentado al la vastaj urbaj amasoj, ili ankaŭ iris al la antaŭurbo por fari tion al komunumanoj.

La situacio sur la literatura kaj arta fronto de nia lando estas bonega. Sub la intima zorgo de la Centra Komitato de la Partio lastatempe okazis en Pekino prezentado farita de artaj trupoj de Norda Ĉinio. Pli ol mil partoprenantaj artistoj de kelkdek artaj trupoj de Pekino, Tiangin, Hebej, Ŝanhi kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio prezentis grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn programerojn, kiuj estas nur parto de multaj programeroj verkitaj de la regiono. La karakterizaĵo de tiu prezentado estas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj peti de ili opiniojn kaj kritikojn.

La kantodancoj de Ulanmuĉi-a propaganda taĉmento de la Interna Mongolio, *Butiko Hiang-jang* kaj *Printempa Hirundo de Junling-brigado* de Pekino, *Pingĝju-opero Ĉe Liema-rivero* de Vejĉang-gubernio de Hebej-provinco kiu priskribas lernon de Daĝaj en agrikulturo, *Jingdiaŭĝju-opero Hirundo en Ŝtormo* prezentata de la urbo Tangŝan de Hebej-provinco kaj rakontanta sanan kreskon de intelektaj gejunuloj en la kamparo, *Floranta Juneco* de Tiangin pri la batalo inter la du linioj sur la eduka fronto, Ŝangdang-a *bangzi*-opero *Batalo en Kooperigo* de la sudorienta regiono de Ŝanhi-provinco pri persista iro de la socialisma vojo fare de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, k.a., havas klaran karakteron de epoka etoso kaj fortan revolucian spiriton kaj estas varme bonvenigataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tiu prezentado estas revuo al la atingoj de la proletaj literaturo kaj arto de norda Ĉinio kaj mobilizado por akiri pli grandajn venkojn en la literatura kaj arta revolucio, kaj havas tre gravan signifon por pluapaŝe praktiki la proletan revolucian literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ kaj prosperigi la socialisman literaturan kaj artan verkadon de nia lando.



Kantodanco Ruĝa Floro sur Stepo prezentata de la Pekina Marioneta Ensemblo

*Dramo Floranta
Juneco prezentata de
la Tiangin-a Drama
Trupo*



La novaj koloraj rakontaj filmoj *Fajraj Jaroj*, *Sunbrila Ĉielo*, *Pina Monto*, *Batalo kontraŭ Inundo* estas sinsekve projekciataj en diversaj lokoj de nia lando. Tiuj kvar filmoj estas aliaj grandaj fruktoj de la Granda Proleta Kultura Revolucio, kaj ankaŭ valora praktiko en alprenado de la sperto en verkado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj por farado de rakontaj filmoj.

Tiuj filmoj estas fruktoj akiritaj de niaj literaturaj kaj artaj laborantoj, kiuj kombiniĝis kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj spertis la ardan vivon en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, kaj klopodis por krei heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La filmo *Fajraj Jaroj* estas sublimumo pri defendo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ fare de la ĉina laborista klaso. La filmo rakontas kiel la ferŝtalaj laboristoj sukcese afinacias specialan ŝtalon por honorigi la patrolandon persistante en la principo de sinapogo sur la propraj fortoj kaj frakasinte la blokadon kaj subfosadon de imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj. Per tio ĝi sukcese kreas modelan figuron de laboristo Ĝaŭ Sihaj kun alta konscio de la du-linia batalo kaj vivece priskribas grandan revo-

lucian volon de la laborista klaso de nia lando. *Sunbrila Ĉielo* priskribas kiel la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kun Hiaŭ Ĉangĉun kiel la reprezentanto faras animskuan batalon sub la gvido de la Partio kontraŭ klasaj malamikoj dum la periodo de agrikultura kooperigo. Ĝi manifestas firman volon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por iro de la socialisma vojo. La rakonto de la filmo *Pina Monto* okazas en iu produkta brigado de trafike malfacila montregiono. La filmo prezentas klasan batalon pro tio, kiu tenu la vipon por veturigi la ĉevalĉaron, priskribas Ĝang Vanŝan kiel modelon, kiu firme iras la socialisman vojon, kaj prikantas la venkon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La filmo *Batalo kontraŭ Inundo* rakontas kiel la popolanoj ĉe ambaŭ bordoj de Hajhe-rivero heroe venkas la eksterordinare grandan inundon neviditan en la lastaj cent jaroj.

Krom la supre menciitaj filmoj estas ankoraŭ projekciataj la kolora Guangdong-opera filmo *Ŝagiabang*, la kolora marioneta filmo *Malgrandaj Okavojaj Armeanoj* kaj aliaj koloraj dokumentaj kaj sciencedukaj filmoj.

Reviviĝo de la ĉina pekina opero

HAŬLIANG, membro de la Ĉina Pekinopera Trupo

LA revolucio de la ĉina pekina opero jam daŭris pli ol dek jarojn sub la direktado de la proleta literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ. La en ĝi naskitaj revoluciaj modernaj pekinaj operoj, revoluciaj modernaj baletoj kaj revoluciaj simfonioj modlis proletajn heroajn figurojn, praktikis la instruon de Prezidanto Maŭ ke literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj la principojn “**Utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio**” kaj “**Kune floru cent floroj, forigu la malnovajn kaj elŝovu la novajn**” kaj ricevis varman laŭdon kaj bonvenigon de la vasta spektantaro.

La revoluciaj modernaj pekinaj operoj naskiĝis en la intensa batalo inter la du klasoj kaj du linioj, kaj iliaj sukcesoj estas granda venko de la proleta literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ super la reviziisma literatura kaj arta linio de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ.

Kiel sinteza scena arto inkluzivanta literaturon, muzikon, belarton, prezentadon kaj dancon, la pekina opero estas unu el la elstaraj naciaj artaj formoj de Ĉinio kaj havas historion de pli ol 200 jaroj. Ĝi

devenis de la popolamasoj kaj heredis eminentajn tradiciojn de la antikvaj teatraĵoj kaj iuj lokaj operoj de nia lando kaj formis en la longa arta praktikado siajn stilon kaj karakterojn kun rimarkinda nacia gusto. Tamen pro la longtempa servo al la reakciaj regantaj klasoj, ĝi estis plena de feŭda, burĝa kaj reviziisma feĉoj, prikantis, beligis imperiestrojn, generalojn, ministrojn, dandojn kaj belulinojn kaj distordis la laborantajn popolanojn.

En 1942, en sia verko *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* Prezidanto Maŭ jam elmetis al ni kompletan marksism-leninisman literaturan kaj artan linion, montrante ke literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tiam la literaturaj kaj artaj laborantoj en Jan-an jam faris reformon al la pekina opero kaj kreis pekinoperan teatraĵon *Premite al Liangŝan-monto por Ribeli*, kiu spegulas kamparanan ribelon en la historio. En sia letero al la Jan-an-a Pekinopera Teatro Prezidanto Maŭ montris: “**La historio estas kreita de la popolo, sed sur la scenejo de malnova opero (kaj en ĉiuj malnovaj literaturaĵoj kaj artaĵoj forlasintaj la popolon) la popolo ja fariĝis feĉo, kaj la**

scenejon regas sinjoroj kaj sinjorinoj, sinjoridoj kaj sinjoridinoj. Tian inversigon de historio vi nun reinversigis, redonante al la historio ties propran fizionomion, kaj de nun la malnova opero akiris novan aspekton”, kaj li esperis ke oni “daŭre verkos kaj ludos multe, por ke tio fariĝu populara kaj disvastiĝu tra la tuta lando!”

Sed, post la Liberiĝo de la tuta lando, Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la literaturaj kaj artaj rondoj Ĝoŭ Jang kaj similaj uzurpis la gvidantecon super la literaturaj kaj artaj rondoj, freneze oponis kontraŭ la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj per la slogano “la literaturo kaj arto por la tuta popolo” ŝanĝis la direkton de literaturo kaj arto servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sub la preteksto ke la pekina opero estas la plej alta formo de arto, ili volis senŝanĝe konservi ĝin kaj oponi kontraŭ reformo de ĝi. Sekve de tio, nia socialisma scenejo de la pekina opero restis regata ankoraŭ de imperiestroj, generaloj, ministroj, dandoj kaj belulinoj, la feŭdbienula kaj burĝa pensoj ĉie inundis kaj venenis la popolanojn, korodis kaj subfosis nian socialisman ekonomian bazon. Samtempe ili elbakis kontraŭpartiajn pekinajn operojn kiel *Deoficigo de Haj Ĵuj* por ataki la proletaron kaj servi al ilia renversado de la diktaturo de la proletaro kaj restarigo de kapitalismo. Tiam en la literaturaj kaj artaj rondoj regis malpura aero alte taksis la antikvajn sed neglekti la nunajn, adori la fremdlandajn sed mallaŭdi la ĉinajn kaj alte taksis la mortintajn sed neglekti la vivantajn. Rigardante tion, la vasta amaso de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj tre indigniĝis dirante: “Tage ni faras revolucion laboron por konstrui socialismon, dum nokte ni rigardas dekadencajn programerojn kiuj prikantas imperiestrojn, generalojn kaj ministrojn de la feŭda socio, priskribas la amaĵojn inter iliaj dorlotataj gefiloj kaj distordas la figurojn de laboruloj. Ni ne ŝatas tiajn programerojn!” Kiel pekinopera aktoro, tiam mi sentis ke mi

vere estas disigita de la epoko kaj de la popolo, kaj ke la pekina opero sin direktas al velkiĝo kaj pereco.

En la jaro 1962, Prezidanto Maŭ faris grandan alvokon “**Nepre ne forgesu la klasan batalon**”, emfazis ke oni devas doni grandan atendon al klasbatalo en la sfero de ideologio. Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, la proletaro unue faris revolucion en la pekina opero, baletoj kaj simfonio, kiuj estis sanktaj kaj netuŝeblaj por la bienuloj kaj burĝaro.

La celo de tiu ĉi revolucio estas ĝisfunde faligi la diktaturon de la nigra literatura kaj arta reviziisma linio, vere praktiki la revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, reinversigi la inversigitan historion dum miloj da jaroj, por solvi la fundamentan problemon kiu okupu la scenejon kaj al kiu servu la literaturo kaj arto, kaj samtempe por revivigi la ruiniĝantan pekinoperan arton en la revolucio.

En novembro de 1963, post ripetada enketado kaj studado kaj atenta elektado, kamaradino Giang King decidis adapti la ŝanhajan operon *Ruĝa Signal-lanterno* en la pekinan. Post longa batalado, ripetada arta praktikado kaj foj-refoja pena kreado, ni sukcesis ĝisfunde ĝin reformi. Fine la opero fariĝis unu el la modeloj de la ĉina proleta literaturo kaj arto, kaj poste ĝi estis kolore filmita kaj projekciita tra la tuta lando. Tiu sukceso trovis varman akklamon de la vasta popolamaso.

La revolucia moderna pekina opero *Ruĝa Signal-lanterno* rakontas kiel la tri generacioj de fervojista familio protektis kaj transsendis sekretan ĉifrolibron al la gerila taĉmento gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj per tio spegulas kiel la armeanoj kaj popolanoj de nia lando, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, heroe batalis kaj sin oferis unuj post aliaj dum la periodo de

la Kontraŭjapana Rezistmilito. La heroo Li Juhe estas komunisto, reprezentanto de la laborista klaso kaj heroa tipo de la proletaro.

Mi ludis heroon Li Juhe en *Ruĝa Signal-lanterno*. Ni ĉiam trovis la prezentejon plena de rigardantoj kaj estis varme akceptataj de post la unua prezento en 1964, ĉie ĉu en fabrikoj aŭ vilaĝoj, ĉu en lernejoj aŭ trupoj. Foje ni prezentis sur provizore starigita scenejo de iu popola komunumo, rigardantoj junaj kaj maljunaj svarmis antaŭ kaj post la scenejo kaj iuj eĉ sidis sur tegmentoj, muroj kaj arboj.

Kial la prezentado de la revolucia pekina opero vekis en la vasta amaso respondon tute malsaman? Ĉar ĝi prezentas la heroan tipon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, spegulas ilian batalan vivon kaj servas al socialismo. Post la rigardo, iu emerita maljuna laboristo de la Pekina Lokomotiva kaj Vagona Fabriko "La Sepa de Februaro" diris al ni: "Mi vivis 70-80 jarojn, kaj unuafoje vidis nian laboristan heroon sur nia pekinopera scenejo. Ni tre ĝojas pri tio." Ankaŭ iu komunumano diris al ni tenante niajn manojn: "La figuroj de via revolucia moderna pekina opero estas tre intimaj por ni. Ju pli ni rigardas, des pli ni ĝojas."

Tio emocias min ĉiufoje kiam mi rememoras la revoluciadon de la pekina opero. Je la komenco, la revolucio de pekina opero jam trafis oponon kaj subfosadon de Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ k.s. Ili fabrikis teoriojn kiaj "divido de laboroj", t.e. la pekinoperaj trupoj ludu nur malnovajn programerojn, dum dramaj trupoj ludu la nuntempajn, por oponi kontraŭ la revolucio de la pekina opero. Utiligante sian potencon, ili malpermesis al nia trupo fari revolucion eksperimentadon. Unuvorte, ili obstine persistis ke la pekina opero povas prezenti nur imperiestrojn, generalojn kaj ministrojn, sed ne laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, t.e. ili ne permesis revolucion.

Dum la kreado de revoluciaj modernaj teatraĵoj, ili aplikis malicajn artifikojn de interna subfosado, nome ŝanĝi la temon, distordi la figurojn kaj detrui la intrigon de la teatraĵo. La batalo estis diversflanka kaj ĝi koncentriĝis en tio kiel modli la heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Elekti kiun kiel sian heroon kaj kiel modli lin decidis tion kiu klaso regu super la scenejo kaj la problemon al kiu servi. Tial, la esenco de la batalo estis ankoraŭ tio kiu okupu la scenejon kaj al kiu servi. Kaj dum la kreado de *Ruĝa Signal-lanterno*, la akra batalo inter la du klasoj estis ja disvolviĝanta ĉirkaŭ la problemo ĉu aŭ ne modli kaj kiel modli Li Juhe, tipan heroon de la proletaro.

Ili ĉiamaniere oponis kontraŭ faro de Li Juhe kiel la ĉefa heroo de la teatraĵo kaj provis egale priskribi la figurojn de la tri generacioj, kiuj estis de ili distorditaj, por ke la figuro de Li Juhe estu puŝita al flanka pozicio. Ili eĉ priskribis la negativan figuron de la agresanto Hatojama tre aroganta, ke li faru faŝisman diktaturon sur la scenejo. Ili ankaŭ per la burĝa naturalismo, distordis la figuron de Li Juhe tiel en lia aspekto kiel en lia spirito. Li estis priskribita kiel homo kiu ne kuraĝis batali kontraŭ la malamikoj, ne havis grandan revolucionan idealon kaj komprenis nenion pri la taktikoj de la Partio en revolucia batalo. Ili eĉ fortranĉis la scenon, kiu sole prezentas la intiman rilaton inter li kaj la amasoj. Ili energie trograndigis la ĉagrenon de patrino, filo kaj nepino ĉe la disiĝo utiligante la morton de Li Juhe por senbride propagandi sensencaĵon kiaj "fari revolucion estas kiel 'ascendi glavan monton'", k.a. Ili volis fari la operon *Ruĝa Signal-lanterno* kiel reviziisman herbaĉon, per la feŭda etiko kaj la burĝa teorio de homeco.

Ni faris decideman malkovron kaj pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ tiuj intrigoj. Kaj ni faris rekreadon al *Ruĝa Sig-*

La tri generacioj de la familio de Li Juhe heroe iras al la ekzekutejo en la majesta muziko de La Internacio.



nal-lanterno laŭ la principo ke la fundamenta tasko de la socialismaj literaturo kaj arto estas klopodi por modli heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj aplikante la kreaĵon de kombiniĝo de revolucia realismo kun revolucia romantikismo. Dum aranĝado de la personaro ni elstarigis la pozitivajn figurojn, la heroojn el la pozitivaj figuroj kaj la ĉefan heroon el la herooj. La priskribo de la negativaj kaj aliaj pozitivaj figuroj kaj la medio ĉiuj devas servi al la elstarigo de la ĉefa heroo. Ni prenis Li Juhe kiel la ĉefan heroon de *Ruĝa Signal-lanterno*, kaj uzis Hatojama kaj aliajn negativajn figurojn en kontrasto kun li. La falseco, malboneco kaj malbeleco de Hatojama estis prenitaj por elstarigi la verecon, bonecon kaj belecon de Li Juhe, kaj la reakcia naturo kaj fatala pereco de la insidema kaj kruela Hatojama estis prenitaj por kontrasti klare kun la proleta revolucia spirito kaj heroeco de Li Juhe kiu timas nek penecon nek morton, por ankoraŭ pli bone elstarigi la figuron de Li Juhe. La rilatoj inter Li Juhe kaj Avino Li, Li Tiemej kaj aliaj pozitivaj

figuroj estas tiuj inter heroo kaj amasoj. Ni priskribas kaj la heroon kaj la aliajn pozitivajn figurojn, tamen la priskribo pri aliaj pozitivaj figuroj nur celas elstarigi en diversaj flankoj la figuron de Li Juhe.

Dum la modlado de la figuro Li Juhe, ni metis lin en tipajn cirkonstancojn de klasa batalo por disvolvi de diversaj flankoj liajn klasan naturon kaj karakterajn trajtojn. Ni priskribis kaj lian akran klasan malamon kontraŭ la malamikoj, kaj lian profundan klasan amon al kamaradoj kaj popoloj; ni montris kaj liajn sagacon kaj bravecon, kaj liajn lertecon kaj aplombecon; kaj ni emfaze priskribis lian senliman amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, kaj lian senliman lojalecon al la komunisma afero. Ĉar tio ĉi estas fonto de liaj fortoj, saĝeco kaj braveco kaj ankaŭ la fundamenta signo ke li estas proleta heroo. Precipe kiam li sin oferis, li pensis ne pri sia vivo, sed pri la afero de la Partio kaj la venko de la revolucio. En la sceno "Batalo sur la Ekzekutejo", ni speciale donis al Li Juhe

lirikan scenon kaj projektis por li kompleton da multtavolaj perfektaj kantmelodioj, por profunde malkovri lian noblan komunisman spiriton kaj montri lian proletan revolucion honestecon ke “por la revolucio mi volonte min oferos”.

Por ĝuste reflektu la rilaton inter la subtera batalo kaj armita batalo de la Partio, ni projektis scenon kiel trupo de la Okavoja Armeo de revolucia bazloko embuskas kaj ekstermas la malamikojn por savi popolamasojn en la de malamiko okupita loko. Tiu sceno ĝuste esprimis la grandan penson ke la subtera batalo de la Partio estas kunordigita kun armita batalo, por ke Li Juhe fariĝu ĉiam praktikanto de la ĝusta linio de la Partio.

Post intensa batalado, ni fine kreis vivan, tipan proletan heroon Li Juhe kiu havas altan proletan konscion, klaran personecon kaj elstaran karakteron.

La kreado de la revolucia moderna pekina opero estas kaj intensa politika batalo kaj profunda arta revolucio. Ĉiuj artaj formoj servas al la politikoj de difinita klaso. Ili servas aŭ al politikoj de la burĝaro aŭ al tiuj de la proletaro. Kiam revolucia ŝanĝiĝo okazis al la politika kaj ideologia enhavo de la pekina opero, tio nepre estigas reformon al ĝia arta formo. La arta formo de la malnova pekina opero tute servis en la pasinteco al pentrado de imperiestroj, generaloj, ministroj, dandoj kaj belulinoj. Dum la longtempa disvolvado, la formoj de ĝiaj kantado, parolado, aktivado kaj luktado kiuj devenis de la pensoj kaj vivstilo de la feŭda reganta klaso fariĝis rigidaj, kaj tute ne povas alkonformiĝi al la bezono en prezentado de socialismaj pensoj. Dum la modlado de la heroaj figuroj de nia epoko, se oni senŝanĝe transprenas la originajn artajn formojn de la pekina opero, tio do certe difektos kaj distordos la figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tute ne konforme al la nuna epoko; se oni nihilisme komplete neas kaj forlasas ĝin en la tuto,

do ni havos nenion por referenco dum arta kreado, perdos la karakterojn kaj stilon de la pekina opero kaj disiĝos de la amasoj. Tial, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ “**Utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio**” kaj “**Forigi la malnovajn kaj elŝovi la novajn**”, ni kritike heredis tion kio estis bona en la malnova pekina opero kaj forĵetis tion kio ne povas reflekti la modernan vivon sed povas difekti la figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tion kio estis esprimiva en priskribado de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ni heredis, formis kaj renovigis kaj samtempe kreis novaĵojn laŭ la bezonoj de prezentado de la figuroj kaj de la reala vivo. Tio ebligas al ni pli bone prezenti heroojn de la proletaro, kaj heredi kaj disvolvi la stilon kaj karakterizaĵojn de la pekina opero.

Kantado en akompano de muziko estas grava komponanto de pekina opero kaj grava rimedo por modli figurojn. Por modli la altan kaj perfektan muzikan figuron de Li Juhe, ni sorbis dum la kreado de *Ruĝa Signal-lanterno* tion, kio estas bona en la muziko de la origina pekina opero en komponado de la arioj por la heroo rompante ĝian formalismon. Ni prenu la ĉefan parton de la ario “Neligblas mia brava volo alta ĝis ĉielo” de Li Juhe en la sceno 8 kiel ekzemplon. Ĝi plene disvolvis la karakterojn de la origina ario nome profundecon, vastecon kaj lirikismon, kaj eliminis ĝiajn melankolion kaj malgajecon. Per tio ĝi fariĝis firma, sonora, brila kaj samtempe multe lirika, kaj formis muzikan kulminon por montri lian noblan kaj grandan menson ĝis pleneco.

En la muziko de *Ruĝa Signal-lanterno*, ni ankoraŭ uzis melodiojn de revoluciaj kantoj konataj kaj amataj de la popolamasoj, ekzemple *Marŝo de Glavoj* kaj *La Internacio* kiuj jam fariĝis nemankigebla parto en la muziko de tiu revolucia moderna pekina opero.

Reformo estas farita ankaŭ al la orkestro. Miksita ĉina-okcidenta orkestro estis kreita kun la enkonduko de okcidentaj instrumentoj sub la jena principo: El la okcidentaj muzikiloj kordaj instrumentoj estas uzataj kiel la bazo; tradiciaj ĉinaj instrumentoj estas elstarigitaj en akompano; kaj inter ĉiuj tradiciaj instrumentoj elstarigo estas donita al *ĝinghu* (du-korda violono), *erhu* (alia tipo de du-korda violono) kaj luna gitaro. Tio ne nur servas al konservo kaj plifortigo de la nacia gusto de pekina opero sed ankaŭ plene utiligis la vastan amplekson kaj simfonian kaj polifonian efikojn de la okcidenta muziko, tiel multege riĉigis kaj disvolvis la esprimivon de la

orkerstra muziko de pekina opero kaj aldonis pli multajn, pli bonajn artajn rimedojn por perfekte modli muzikajn figurojn de laboristaj, kamparanaj kaj soldataj herojoj.

Ankaŭ en la teknikoj de prezentado, dancado kaj sceneja dekoracio, ni faris la laboron **“forigi la malnovajn kaj elŝovi la novajn”**. Ekzemple en la prezento kaj danco ni faris ĉiun movon de Li Juhe konforma al la reala vivo kaj samtempe retenis la graciecon, fortecon kaj pozadon de la tradiciaj scenejaj aktivadoj kaj dancaj movoj de pekina opero, tiel ke kombiniĝis organike la nova kaj la malnova kaj fariĝis

Haŭliang kantas por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.



speciala danclingvo de la revolucia moderna pekina opero en modlado de herooj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Ĉiuj niaj klopodoj faritaj en muziko, aktivado, dancado, sceneja dekoracio kaj lumigo servis por pli bone krei kaj elstarigi la heroajn tipojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur la scenejo, kaj akiri unuigon de revolucia politika enhavo kaj kiel eble plej perfekta arta formo.

La revolucio de pekina opero ascendigis la heroajn figurojn de la proletaro sur artan scenejon, reinversigis la inversigitan historion dum miloj da jaroj, reprezentis la ĉefan direkton de la literatura kaj arta revolucio, komencis la preludon de la Granda Proleta Kultura Revolucio, kaj solvis en praktikado serion da gravaj problemoj en la proleta literatura kaj arta kreado.

Kaj samtempe, ĝi havigis novan vivon al la antikva ĉina pekina opero, kaj faris ĝin proleta arto servanta al la revolucio kaj popolo.

La revolucio de pekina opero gigante kuraĝigis kaj antaŭenpuŝis la revolucion sur diversaj kampoj de la superstrukturo. Kaj sub la konduko de revoluciaj modelaj teatraĵoj profunda revolucia ŝanĝiĝo okazis al la literaturaj kaj artaj rondoj de Ĉinio, kaj tie troviĝas prospera kreskado de literatura kaj arta kreado dum la pasintaj kelkaj jaroj. La spertoj akiritaj en kreado de revoluciaj modelaj teatraĵoj estas uzataj en kreado aŭ adaptado de lokaj operoj, dancoj, rakontado k.a., kiuj aperas nombre jam sur scenejoj. Nun la amasa movado de literatura kaj arta kreado prospere leviĝas tra la tuta Ĉinio.

Sceno el la revolucia moderna pekinopero Batalo sur Ebenaĵo





La Bona Sekretario de Nia Brigado *prezentata de Ulanmuĉi-a Propaganda Taĉmento*

Propaganda taĉmento sur stepo

de ĴENZONG

LA programeroj prezentitaj de la Ulanmuĉi-a Propaganda Taĉmento sub la rekta gvido de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, plenaj de politika entuziasmo, forta batalspirito, klara arta stilo kaj intensa vivetoso, donis al la spektantoj fortan stimulon.

La 15 membroj de tiu taĉmento ĉiuj estas mongoloj. Ilia prezentado plene montris la senliman amon de la diversaj naciecoj de la Interna Mongolio al la Partio, Prezidanto Maŭ kaj la socialisma nova vivo. Ekzemple, la soprana solo *Prezidanto Maŭ*, *la Popolanoj sur Stepo Amas Vin* elmontras la revolucionan idealon de la popolanoj sur la stepo, prikantas ilian firman decidon konstrui la limregionon kaj defendi la patrolandon sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio

de Ĉinio kaj esprimas profundan proletan amon de la vastaj amasoj de paŝtistoj al la Partio kaj Prezidanto Maŭ per mongola tradicia sonora melodio kaj libera ritmo. La danco *La Riĉajn Fruktojn al Prezidanto Maŭ* simple kaj profunde prezentas ke vastaj amasoj de paŝtistoj laŭte kantas kaj ĝoje dancas por prikanti la saĝan gvidon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ dum celebrado de riĉa rikolto. La belaj kaj versimilaj dancmovoj prezentantaj nutradon de ŝafido kaj lanotondadon kvazaŭ venigus la spektantojn sur senliman stepon.

Ekde sia fondiĝo en 1966, la jaro en kiu komenciĝis la Granda Proleta Kultura Revolucio, la Ulanmuĉi-a Propaganda Taĉmento ĉiam persistas ĉe la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, profundiĝis en amasojn kaj ardajn bataladojn



La gestkantado Vizito al Nia Lingarda Kompanio

por krei kaj prezenti por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. En la proceso de kreado kaj prezentado ĝi sekvas la principon forigi la malnovajn kaj elŝovi la novajn rilate al la nacia arta stilo kaj persiste klopodas por efektiviĝi unuiĝon inter socialisma enhavo kaj nacia stilo. Antaŭ nelonge ĝi prezentis en la ĉefurbo Pekino parton de siaj programeroj. La danco *Ĉevalkaptilon al Ni Junuloj* estis kreita de ĝi, kiu, en sia vivo kun paŝtistoj, propraokule vidis kortuŝajn aferojn de multaj intelektaj junuloj en fiksloĝado en la landlima regiono, akceptado de eduko de la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj kaj ilian decidon fariĝi socialismaj novaj paŝtistoj. La danco, kun lerno de manipulado de ĉevalkaptilo kiel ĉefa enhavo, spegulas kiel sane kreskas la proletaj revoluciaj daŭrigantoj sub la kulturado de veteranaj paŝtistoj. La danco de rajdado sur ĉevalo kaj kaptado de ĉevalo havas kaj vivetason kaj naciecan karakteron kaj elmontras la serenajn spiritojn kaj kuraĝecon de la paŝtistoj. *Haŭlajbaŭ* (unu el la prezentaj formoj kun kanto) *La Bona Sekretario de Nia Brigado* estis kreita de ĝi, post kiam ĝi vizitis multajn modelojn de lerno de Daĝaj, konis avangardajn farojn de nemalmultaj sekretarioj de partiaj filioj, kiuj kondukas amasojn por konstrui paŝtregionon kaj lernis verkan sperton de la revoluciaj modelaj teatraĵoj. Tiu programero kreis figuron de sekretario de partia filio de brigado, kiu tenas striktan rilaton kun ama-

soj kaj tutkore servas al la popolo, per kantado, gestado kaj sprita dialogo. La gestkantado *Vizito al Nia Lingarda Kompanio* estis kreita de ĝi dum la vizitado al landlima gardejo en frosto de 40 gradoj sub nulo. La programero prezentas varman scenon ke paŝtistoj kun donacoj de popolanoj, svingante vipon, konkure rapidigas sian ĉevalon sur la vojo al landlima gardejo, kio esprimas intiman rilaton inter la paŝtistoj kaj la popolaj gardantaj soldatoj similan al tiu inter fiŝo kaj akvo. Kun apartaj karakterizaĵoj la figuroj de veterana paŝtisto, milicanoj kaj soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo estas versimilaj kaj elmontras la senruzecon de la laborantaj popolanoj. Tiuj programeroj, kreitaj en la praktika vivo, havas revolucionan politikan enhavon kaj batalan artan stilon kaj spegulas revolucionan spiritojn de nia epoko. Tuj je la komenco la prezentado jam firme kaptis spektantojn kaj vekis en iliaj koroj fortan resonon. Sur la scenejo la aktoroj prezentas kun granda entuziasmo, dum la spektantoj rigardas kun granda intereso. Tiamaniere plene disvolviĝis la eduka kaj kuraĝiga rolo de revolucia literaturo kaj arto.

Ulanmuĉi estas speco de propaganda taĉmento sur la stepo de la Interna Mongolio. En ĝia longtempa profundigo en amasojn kaj persistado en servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, formiĝis ĝia klara karakterizo: ĝiaj membroj estas

malmultaj kaj elitaj kaj havas multajn kapablojn, ĝiaj programeroj estas malgrandaj kaj variaj, kaj ĝia aktivado fleksebla. Ĉiuj membroj lertas en dancado, kantado kaj ludado de muzikiloj. Ofte estas, ke demetinte akordionon, oni tuj prenas ĉevalkapan violonon por ludi kaj fininte kolektivitan dancon, oni devas partopreni en gestkantado. En unu horo kaj 40 minutoj ili prezentis 14 programe-rojn de ĥoraĵo, solo, gestkantado, solo de muzikilo kaj diversaj malgrandaj dancoj kun riĉa enhavo kaj variaj formoj. Ili postlasis siajn piedsignojn ĉie sur la vasta stepo de la Interna Mongolio. En la jaro 1973, ili en 90 tagoj iris pli ol 3,000 kilometrojn por prezenti en hoŝoj (gubernioj), komunumoj kaj jurtoj. Ili faris prezentojn al centoj aŭ dekoj da homoj, kaj ankaŭ al unuopaj familioj. Kiam la amasoj rigardis prezentadon de Ulanmuĉi, ili ĉiam tre emociiĝis kaj kore dankis la Partion kaj Prezidanton Maŭ pro la zorgo al ili.

La dirita taĉmento estas unu el la dekoj da ulanmuĉi-aj propagandaj taĉmentoj de la Interna Mongolio. Post sia naskiĝo en 1957 tieaj propa-gandaj taĉmentoj disvolviĝas kaj progresas en akra batalado inter la du klasoj kaj du linioj. En la komenco Liu Ŝaŭki, Ĝoŭ Jang kaj similaj kontraŭ-revoluciaj reviziistoj kalumniis ulanmuĉi-ajn pro-pagandajn taĉmentojn, ke ili estas “nekompetentaj”

kaj “neregulaj”, kaj devigis iujn el ili malorganiziĝi, intencante sufoki ilin en lulilo. La membroj de la ulanmuĉi-aj propagandaj taĉmentoj ripetfoje studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, firme kredis la ĝustecon de sia direkto de servado al la laboris-toj, kamparanoj kaj soldatoj kaj kontraŭstaris la nigran venton de la reviziisma linio. Poste, vidinte ke la ulanmuĉi-aj propagandaj taĉmentoj estis nesubpremeblaj, iuj proponis ke ili faru sin “pro-fesiaj” kaj “grandaj trupoj” sub la preteksto de “subteno”. La taĉmentanoj malkovris tiun in-trigon, decideme repuŝis ĝin kaj daŭre disvolvis sian bonan tradicion. En la jaro 1964, reprezen-tanta taĉmento de Ulanmuĉi venis al la ĉefurbo Pekino por prezenti kaj estis glorie akceptita de Prezidanto Maŭ. La kora zorgo de Prezidanto Maŭ donis al ili grandan kuraĝigon kaj pli firmigis ilian decidon praktiki la revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ.

Nun, ĉiuj hoŝoj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio starigis sian propran ulanmuĉi-an propagandan taĉmenton. Ili aktivas en vastaj kamparoj kaj paŝtregionoj, kombinante siajn krea-don kaj prezentadon kun aktualaj bataloj. Hodiaŭ la ulanmuĉi-aj propagandaj taĉmentoj jam fariĝis ruĝa avangardo sur la literatura kaj arta fronto.



Prezentado por paŝ-tistoj

Rakonta filmo

“Fajraj Jaroj”

LA epoka vagonaro ruliĝas antaŭen. Kaj en triumfa huraado, oni bonvenigas la jaron 1962...

Longa fajfado. La Pekin-Ŝanhaja ekspreso alkuras fulmrapide kontraŭ frosta neĝblovo. En la manĝovagono, iu fortika laboristo altstatura atenteme aŭskultas la radiodisaŭdigatan ĉefartikolon de la novjara tago de *Renmin Ribao*. Li estas Ĝaŭ Sihaj, estro de afinacia grupo de la Ŝanhaja Ferŝtala Fabriko, kiu revenas de Pekino post partopreno en la tutlanda kunveno pri metalurgia laboro.

“La vojo de internacia batalo estas nek ebena, nek rekta. Sur la ĉielo povas aperi nigraj nuboj, kaj sur la maro povas leviĝi ŝtormo. Nun... en la internacia komunisma movado, aperas aferoj pro kiuj oni ne povas ne ĉagreniĝi.” La radio-dissendo malkvietigas Ĝaŭ Sihaj. Antaŭ la akra kaj intensa internacia klasbatalo lian vizaĝon regas seriozeco.

Ĝaŭ Sihaj venas al la litvagono por viziti fabrik-estron Baj. Tiu konversacias kun sia malnova kunbatalanto — oficiro de mararmeo. La oficiro diras ke la lando, kiu pretendas ke ĝi estas “socialisma lando”, postulas organizi kune kun ni “unuecan militŝiparon” kun la celo regi nian nacidefendon. Post nia rifuzo pri tio, ĝi trompe vendis al ni malbonajn ŝtalaĵojn kiel bonajn por nia fabrikado de novaj militŝipoj. Fine ĝi disŝiris la kontraktojn kaj retiris siajn specialistojn el Ĉinio, vane klopodante per tio peli nin en ĝian reton. Nun ni urĝe bezonas specon de speciala aloja ŝtalo en fabrikado de novaj militŝipoj, tamen, ĝin ankoraŭ neniam produktis nia lando... Aŭskultante, Ĝaŭ Sihaj meditas en si: La reviziistoj strangolas nian kolon! Ni devas produkti altklasan alojan ŝtalon por gajni honoron por la ĉina laborista klaso! Je la adiaŭo, la mararmea oficiro donacas al Sihaj la ŝtalan specimenon de la falsa amiko.

En la hejmo de Sihaj, tre indignas la kunbatalantoj lin vizitantaj vidinte la specimenon. Kaj

ili faras decidon, ke ili nepre produkti tian ŝtalon por gajni honoron por la patrolando kaj rompi la blokadon de imperiismo, reviziismo kaj la reakciularo.

En profunda nokto, Ĝaŭ Sihaj ankoraŭ studas la verkon de Prezidanto Maŭ. **“Ili blokadu! Ili blokadu ok aŭ dek jarojn, kaj tiam ĉiuj problemoj de Ĉinio povos esti solvitaj.”** La instruo de Prezidanto Maŭ des pli firmigis lian decidon. Li iras al gvidantoj de la fabriko kaj postulas ke la fabriko akceptu la taskon produkti specialan alojan ŝtalon por konstruado de militŝipoj. Kaj kune kun aliaj laboristoj li elmetas projekton por prove afinacii tian ŝtalon per alojo produktita de nia lando mem, laŭ la principo de sinapogo sur la propraj fortoj. La mastra kaj ĝisfunde revolucia spirito de la laboristoj ricevas la subtenon de Vang Gian, sekretario de la partia komitato de la fabriko, sed pri tio la fabrikestro Baj Hianĝoŭ tre maltrankviliĝas. Li ankoraŭ havas iluzion pri tiu “socialisma lando” kaj donas sian tutan atenton al importado de alojo por produkti tian ŝtalon post akcepto de la tasko.

Ĉu sinapogi sur la propraj fortoj aŭ sur importado? Ĉirkaŭ tiuj du linioj, aperas la rakonto de akra batalo.

Sub la gvido de Ĝaŭ Sihaj, la laboristoj komencas preparadon por fari la provan afinacion.

Trans montoj kaj riveroj, Ĝaŭ Sihaj vizitas maljunan majstron Tian, kiu prove afinaciiis tian ŝtalon sed ne sukcesis en la jaro 1958. Post sia emeritiĝo, Tian sin ĵetas en la ardan konstruadon de hidroelektrejo en la kamparo. Informiĝinte ke la afinacio renkontis malfacilon, la blankhara laboristo decideme revenas al la fandejo kun tornistro sur la dorso.

Tamen fabrikestro Baj Hianĝoŭ iras alian vojon. Li venas al la bordo de la pitoreska Tajhu-lago por interkonsiliĝi kun la ĝenerala inĝeniero en sanatorio. Pri la prova projekto de laboristoj ili venas al la sama konkludo: “Netrairebla estas la vojo.”

La fabrikestro volas ke Sihaj forlasu la provan projekton kaj ekkomencu la afinacion nur post ricevo de la importita aloj, tamen, la lasta postulas ke la partia komitato diskutu la projekton. Post diskutado, plejparto de la membroj de la partia komitato subtenas la revolucionan spiriton de Ĝaŭ Sihaj kaj la komitato sankcias la projekton.

Subtenate de la laboristoj de la tuta fabriko, la grupo de Ĝaŭ Sihaj luktas antaŭ la forno tage kaj nokte. Dum la senĉesa eksperimentado, ili venkas malfacilojn unu post alia, senĉese resumas la sperton kaj antaŭenmarŝas kun granda energio. Post foj-refoja eksperimentado, baldaŭ sukcesos la afinacio. Sed sur la vojo estas multaj dornoj, la venko de la revolucio indignigis la reakciulojn ĝis dentgrincado kiuj malamas la socialisman Ĉinion. La kaŝita kontraŭrevoluciulo kaj direktoro de produkta distribuejo Jing Giapej tuj je la komenco jam kaŝe oponas kontraŭ la prova afinacio utiligante la konservativon de fabrikestro Baj. Kaj la bruado de Ĉiang Kajŝek en la provinco Tajvan por ataki la kontinenton instigas lian kontraŭrevolucionan aktivadon. En la momento kiam baldaŭ sukcesos la prova afinacio fare de la grupo de Ĝaŭ Sihaj, li aplikas malican kontraŭrevolucionan rimedon, nome ŝtele miksi en la materialon por prova afinacio malutilan elementon, kaj kaŭzas gravan akcidenton brultruigi fundon de la fandujo; kaj samtempe li instigas aliajn raportoj al la fabrikestro la "sukceson" tamtamante kaj tamburante por indignigi lin.

En tiu kriza momento, timante nenium danĝeron kaj ekprenante ferstangon, Ĝaŭ Sihaj rapidas post la fornon spite de densa fumo kaj arda temperaturo, kaj fine li truigas la elfluejon de la forno per la tuta forto. Tiel evitata estas eksplodo de la forno kaj elsavitaj estas la kunbatalantoj. Fabrikestro Baj hastas al la loko kaj krude ordonas ke Ĝaŭ Sihaj forlasu la fornon kaj sin ekzameni je provizora eksigo de laborposteno.

Tamen tio kion antaŭ ĉio pensas Ĝaŭ Sihaj, komunisto kun alta konscio de linia batalo, estas ke li ne plenumis la taskon asignitan de la Partio al li. Li komprenas, ke tio, ĉu aŭ ne afinacii tian ŝtalon, koncernas la demandon kian linion praktiki, koncernas la tutan aferon,

tial li respondas al la fabrikestro: "Vi povas provizore eksigi min je mia laborposteno, tamen la afinacio nepre devas esti daŭrigata!"


Malsukceso neniel povas ŝanceli la revolucionan volon de Ĝaŭ Sihaj. Kun akra revolucia singarde-mo li sentas ke la akcidento okazis tute ne hazarde, tial kiam Jing Giapej indikas ordigi la lokon, li elpaŝas por protekti la akcidentejon de ŝanĝo kaj per tio fiaskigas lian intrigon por malhelpi ekzamendon pri la akcidento.

Vundiĝas maljuna majstro Tian dum la urĝa savado. Post la akcidento Ĝaŭ Sihaj iras al la hospitalo por vidi lin. La majstro kaj la metiler-nanto kuraĝigas unu la alian kaj ili havas unu saman volon: Nepre afinacii tian ŝtalon por honorigi la patrolandon. Ankaŭ aliaj laboristoj de la fabriko aktive helpas la grupon de Sihaj en analizado pri la akcidento.

Por kovri sian krimon kaj pluapaŝe strangoli la provan afinacion, Jing Giapej unuflanke klopodas pruvi ke la akcidento estas kaŭzita de altigo de la fanduja temperaturo fare de Sihaj kaj aliaj, aliflanke li admonas kun ŝajnigita zorgo ke Sihaj lernu en teknika kurso. Kun akraj okuloj Ĝaŭ Sihaj refoje travidas la malican artifikon de Jing Giapej kaj respondas decideme: Estas tute neeble ke mi ĉesu

Vang Gian, sekretario de la partia komitato de la Ŝanhaja Ferŝtala Fabriko, firme subtenas Ĝaŭ Sihaj, kiu volas afinacii specialan ŝtalon per materialoj produktitaj de nia lando mem por honorigi la socialisman patrolandon.





Majstro Tian vundiĝas pro la akcidento farita de la malamiko en la afinaciado de la speciala ŝtalo. Sed en hospitalo li ankoraŭ kuraĝigas Ĝaŭ Sihaj, ke li nepre daŭrigu la afinacion.

fari provadon! Refoje fiaskas la intrigo de Jing Giapej.

En tiu tempo, Ĝaŭ Sihaj ankoraŭ renkontas baron devenantan de la konservativo interne de la laborista klaso. Vicgrupestro Ĉen Joŭgen submetiĝas al la premo de erara linio kaj admonas ke Sihaj ne ĉiam “kontraŭstaru” la gvidanton. Ĝaŭ Sihaj pacience klarigas al li la signifon de konstruo de la patrolando laŭ la principo sinapogi sur la propraj fortoj, kaj konvinkiĝas post ripetfoja analizo ke la akcidento certe estas subfosado de malamiko. Li varme kuraĝigas la kunbatalanton brave batali kaj antaŭenmarŝi kontraŭ la ventego.

Post kunveno en supera administrejo, la partia sekretario Vang Gian tuj faras enketadon pri la akcidento kaj donas fortan subtenon al Ĝaŭ Sihaj kaj la aliaj. Per la brila poemo de Prezidanto Maŭ en respondo al la internacia kontraŭĉinia fluo, li kuraĝigas la laboristojn al venko super la malamikoj kaj malfaciloj.

*Fortikaj pinoj staras jen en gazo de vespero,
Trankvilas ili, dum nubaro flugas en pelmelo.
Naturo kreis artoplene la Feo-kavernon,
Sur la montpintoj de danĝero sorĉas rava
belo.*

Ĝaŭ Sihaj kaj liaj kunbatalantoj decidas esti “fortikaj pinoj” de la epoko kaj daŭre antaŭenmarŝi en la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

Kiam la laboristoj luktas senĉese kaj pretas denove komenci la provan afinacion, fabrikestro Baj tamen ankoraŭ atendas la alvenon de importita aloj. Kaj kiam li informiĝas ke la eksportanta lando malpermesis eksporti tian aloj, kaj la espero de importado tute malaperis, Jing Giapej tuj utiligas tiun ĉi ŝancon por agiti lin ke li simple redonu la akceptitan taskon de produkto de tia speciala ŝtalo. Kaj Baj Hianĝoŭ, kiu perdis la spiriton sinapogi sur la propraj fortoj kaj devojiĝis, eĉ fariĝas kaptito de la klasa malamiko kaj persone skribas raporton por redoni la akceptitan taskon.

Informiĝinte pri tio, Ĝaŭ Sihaj forte indignas, li rapidas al la kabineto de la fabrikestro kaj severe demandas kial li tion faris. Baj Hianĝoŭ, kiu blinde kredas nur fremdajn landojn kaj specialistojn, tute ne povas vidi la forton de la laboristoj kaj ankoraŭ persistas pri sia eraro. Detenante sian indignon, Ĝaŭ Sihaj firmege diras: “Vi estas fabrikestro jam ne de ni laboristoj!” Poste li tuj eliras.

Informiĝinte pri tio, laboristoj indigne kolektiĝas kaj skribas *dazibaŭ*-ojn por akre kritiki fabrikestrotron Baj.

Spite al la malhelpo de la fabrikestro, Sihaj kaj la kunbatalantoj refoje ekhejtas la fornon en la kvara datreveno de la inspektado de Prezidanto Maŭ al la fabriko, kaj per tiu praktika ago afinacii tian ŝtalon ili rememorigas tiun neforgeseblan tagon. Informiĝinte de la telefona raporto de Jing Giapej pri tio, Baj Hianĝou kolere rapidas al la fandejo kaj eĉ refoje ordonas ĉesigi la afinacion.

Dum tia severa momento, Ĝaŭ Sihaj neniom sin retiras. Kun emocio li atenteme elprenas el la sino informilon ruĝe presitan. Tio estas informilo presita de la fabriko pri la ĝojinda inspektado de Prezidanto Maŭ al la fabriko antaŭ kvar jaroj. Dum la pasintaj kvar jaroj, li ĉiam atenteme konservis la informilon. Alte tenante la informilon antaŭ la fabrikestro kaj la aliaj laboristoj, Ĝaŭ Sihaj esprimas sian lojalecon al la partia afero kaj la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Liaj vortoj forte martelas ilian koron. Li demandas al fabrikestro Baj, kial li forgesis la karan instruon de Prezidanto Maŭ al li kaj la laboristoj antaŭ kvar jaroj: Vi devas diligente labori kaj strebadi al prospero vin apogante sur viaj propraj fortoj.

Sub la edukado de la laboristoj, fabrikestro Baj tiam ekmemoras la instruon de Prezidanto Maŭ

kaj kun larmo en la okuloj li akceptas per siaj ambaŭ manoj la informilon donitan de Ĝaŭ Sihaj.

Tamen Jing Giapej ankoraŭ ne volontas akcepti sian fiaskon kaj vane klopodas refoje detrui la provadon kvazaŭ hundo pelata transsaltas muron. Apenaŭ lia ungo etendiĝas, li jam falas en la vastan reton de la laboristoj.

Sub la gvidado de la Partio, Ĝaŭ Sihaj kaj la kunbatalantoj venkis la malamikon, unuigis la kamaradojn kaj venkis la malfacilojn unu post aliaj, kaj fine sukcesis afinacii la specialan alojan ŝtalon.

Ĝoje kantas la ondanta Orienta Ĉina Maro kaj torentas ŝtallikvo! Invitite de militŝipa trupo de la mararmeo, la respondeculoj de la ferŝtala fabriko kaj Ĝaŭ Sihaj partoprenas en la ceremonio de prova navigo de novaj militŝipoj konstruitaj per niaj ŝtalaĵoj. Sur la lazura maro kaj sub la blua firmamento imponaj militŝipoj rapide preterpasas en kolono rompante ondojn.

Kaj la bravaj ŝtallaboristoj kreskantaj en la fajraj jaroj sin ĵetas en novan batalon kontraŭ ventego kaj ondegoj...



Por kovri sian krimagon, Jing Giapej admonas ke Ĝaŭ Sihaj lernu en teknika kurso. Sed Ĝaŭ Sihaj travidas lian malican artifikon.

La esenco de la skribaĵo de Lin Biaŭ “sinregi por restarigi la etiketon”

SAME kiel la aliaj agoniantaj reakciuloj de diversaj historiaj periodoj, la burĝa karieristo, konspiristo, duvizaĝulo, renegato kaj naci-perfidulo Lin Biaŭ prenis konfucianismon kiel reakcian ideologian batalilon por restaŭri kapitalismon. La 19-an de oktobro de 1969, sin kaŝinte en malluma angulo, Lin Biaŭ skribis sinsekve du rulpendaĵojn kun sama teksto donace al sia ĝismorta bandano kun cito de la vortoj el la libro *Lun Ju* “sinregi por restarigi la etiketon”, nome: “El ĉiuj aferoj la plej grava estas nur tio: sinregi por restarigi la etiketon.”

Tuj kompreninte la aludon, lia ĝismorta bandano skribis je la 23-a de oktobro la samon responde al sia mastro Lin Biaŭ por montri sian decidemon por kontraŭevolucio. En la novjara tago de 1970, kiam nia popolo brave eniris en la grandajn sepdekajn jarojn kaj venke marŝis antaŭen en la intensa batalo inter la du linioj, Lin Biaŭ skribis je la tria fojo la samenhavan rulpendaĵon. Por certigi ke lia ĝismorta bandano ne miskomprenu lin, li speciale ripetis la vortojn “nur tio” en la teksto, ne kiel pleonasmon, sed intencan emfazon: “El ĉiuj aferoj la plej grava estas nur tio, nur tio: sinregi por restarigi la etiketon.”

En la mallonga periodo de malpli ol tri monatoj, Lin Biaŭ kaj lia bandano skribis sinsekve fojon post fojo la devizon de Konfucio “sinregi por restarigi la etiketon”, emfazante ĝin kiel la plej gravan aferon el ĉio. Kiel urĝe neprokrastebla estis la plenumo de ilia volo por kontraŭevolucio! Kaj kiel frenezaj ili fariĝis, perdinte sian prudenton!

Kia varo estas do la nomita slogano de Konfucio? Kion celis Lin Biaŭ kaj lia bando, tiel fervorege pledante por ĝi? Kian “etiketon” ili volis restarigi? Kion ili finfine deziris?


“Sinregi por restarigi la etiketon” estis la politika programo de Konfucio por restaŭri siatempe la sklavan sistemon. La periodoj de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) kaj de la Militantaj Regnoj (476-221 a.K.) estis tempo de granda ŝanĝo en la ĉina historio, dum kiu la socio estis transiranta de sklava sistemo al la feŭda. Tiutempe, la lando estis en granda malordo, la malnova ordo de sklava sistemo — etiketa sistemo — estis plene bankrotanta, dum la nove leviĝanta feŭda sistemo kreskis tagon post tago. Vizaĝe al tiu situacio, Konfucio elmetis la reakcian sloganon “sinregi por restarigi la etiketon”, por defendi kaj restaŭri sklavan sistemon kaj oponi kontraŭ la reformo de la nove emerginta klaso de terposedantoj. “Sinregi” signifas, ke oni limigu siajn dezirojn kaj agojn laŭ la “etiketo de Ĝoŭ-dinastio”, kiu spegulis la fundamentajn interesojn de la sklavposedantoj. En tiu tempo, li ĉefe volis, ke la nove aperinta klaso de terposedantoj kaj sklavoj estu fidelaj senkondiĉe al la sklavposedantoj, ne oponu kontraŭ superuloj kaj ne ribelu kontraŭ ili. La celo de “sinrego” estis “restarigi la etiketon”. Kaj “restarigi la etiketon” signifas restaŭri la disfalintan ordon de sklavsistema regado de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio, nome la superstrukturon de sklava socio. Estas evidente ke la nomita slogano de Konfucio spegulis la reakcian volon de la dekadencaj sklavposedantaj nobeloj, ke ili ne volontis akcepti la sorton de pereco kaj deziris mortan batalon kontraŭ la nove leviĝantaj fortoj; ĝi estis centpocenta reakcia politika programo kontraŭ socia reformo, por returni la historian radon kaj restaŭri la sklavan sistemon de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio (ĉ.11-a jc.-771 a.K.).

Malkovrante aktivadon regresan al malnovo fare de reakciuloj, Lusin montris: “Por regresado

al malnovo, la nunaj ĉinaj obstinuloj sin turnis eĉ al la tezoj pri 'etiketa edukado' de Konfucio" ("pri la Intelektularo", *Suplemento al la Verkoj ekster la Kolektitaj*), kaj "estante nuntempuloj kaj spirante nunan aeron, ili tamen klopodas distrudi putran ideologion kaj mortan lingvon kaj kalumnii ĉion nuntempan" ("Murdistoj de la Nuntempo" — diversaj pripensoj n-ro. 57, *Varma Vento*). La kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ ĝuste estas tiaj kontraŭrevoluciaj obstinuloj. Ili elportis la rigidiĝintan kadavron politikan de Konfucio kaj heredis lian doktrinon kultante lian tezon "sinregi por restarigi la etiketon" kiel sanktaĵon, kio plene malkaŝis ilian kriman celon de renverso de la diktaturo de la proletaro kaj restaŭro de kapitalismo en nia lando.

Kompreneble, Lin Biaŭ kaj Konfucio vivis en malsamaj historiaj kondiĉoj kaj malsama estas ankaŭ ilia klasa enhavo de la sama slogano "sinregi por restarigi la etiketon". Konfucio vivis en la historia periodo kiam la socio transiris de sklava sistemo al la feŭda, kaj reprezentante la klason de sklavposedantoj li intencis restarigi la "etiketon" de la sklava sistemo; dum Lin Biaŭ vivis en la historia periodo de diktaturo de la proletaro kaj, reprezentante la renversitajn klasojn de bienuloj kaj burĝoj, klopodis restaŭri la "etiketon" de kapitalismo. Sed Lin Biaŭ kaj Konfucio estis tute samopiniaj en la baza problemo oponadi kontraŭ socia reformo, pledadi por regreso kaj entrepreni kontraŭrevolucionan restaŭron. Sub la nigra flago de Konfucio "sinregi por restarigi la etiketon" Lin Biaŭ plene elmontris sian kontraŭrevolucionan monstran vizaĝon, kaj en la konspira aktivado de Lin Biaŭ "sinregi por restarigi la etiketon" vagis la fantomo de Konfucio.

La "restarigo de etiketo" de Konfucio estis antaŭenpuŝo de la kontraŭrevolucia linio "restarigi pereintajn regnojn, daŭrigi la interrompitajn aristokratajn familiojn, relevi la defalintajn homojn", restaŭri la pereintajn sklavsystemajn regnojn, restarigi la heredan rajton de sklavposedantaj nobeloj, por ke la defalintaj nobeloj kaj nobelidoj ree enpotenciĝu kiel reflamiĝo de cindro kaj plue ekspluatu kruele la sklavojn. Kaj tiu de Lin Biaŭ estis antaŭenpuŝo de kontraŭrevolucia reviziisma linio, t.e. kapti al si la plej altan potencon de la Partio kaj la ŝtato kaj fundamente ŝanĝi la bazajn linion kaj politikojn de la Partio dum la tuta socialisma historia etapo, renversi la diktaturon de la proletaro kaj restaŭri kapitalismon. Ĝuste por mobilizi siajn ĝismortajn sekvantojn al urĝa kaptado de regpotenco, intense konspiri kontraŭrevolucionan puĉon



Laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio forte kritikas Lin Biaŭ, kiu intencis restaŭri kapitalismon per Konfucianismo.

kaj efektiviĝi la kontraŭrevolucionan reviziisman linion, Lin Biaŭ kaj lia bandano sinsekve en tri fojoj, ree kaj ree elmetis la reakcian sloganon "sinregi por restarigi la etiketon" en la mallonga periodo de oktobro de 1969 ĝis januaro de 1970.

Por realigi sian sonĝon de restaŭro, Lin Biaŭ tage kaj nokte sopiris kapti al si la plej altan potencon de la Partio kaj la ŝtato. Li alprenis la eluzitan armilon de "ĝustigo de nomoj" de Konfucio, la pramajstro de restaŭristoj. En majo de 1970, li arogante kontraŭstaris la instrukcion de Prezidanto Maŭ, instigis siajn ĝismortajn sekvantojn fari ofensivon kontraŭ la Partio, brue kriante ke "manko de estro al ŝtato" signifas mankon de ĝusteco en la nomo, kaj sekve la paroloj ne povas esti dece faritaj". Publike sin apogante sur la prediko de Konfucio, ke "se la nomoj estas malĝustaj, la paroloj ne povas esti decaj; se la vortoj estas nedecaj, aferoj ne povas esti adekvate plenumitaj", la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ obstine persistis je la kontraŭpartia politika programo, kun la aroganta intenco uzurpi la plej altan potencon de la Partio kaj la ŝtato. Por diri eksplicite, se



La intelektaj gejunuloj fiksloĝantaj en Ŝujjuan-komunumo de Liaŭning-provinco skribas dazibaŭ-ojn por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion.

Lin Biaŭ ne ĵfariĝus “estro de la ŝtato”, ne povas esti ĝusta nomo; se ĝusta nomo mankas al li, li ne povas efike komandi kaj ne eblas “restarigi la etiketon”, do la afero de restaŭro de kapitalismo ne povas esti sukcese plenumita. Laŭ la opinio de Lin Biaŭ kaj liaj sekvantoj, ĉio de la socialisma nova Ĉinio, la bonega situacio kaj nove emergintaj aferoj de la Granda Proleta Kultura Revolucio entute ne konformis al lia “etiketo”. Ili atakis la diktaturon de la proletaro, postulis ke la restanta feĉo de la Ĉiang-Kajŝek-a dinastio, la nereformitaj bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj, dekstruloj, renegatoj, spionoj kaj ĝismorte pentorifuzantaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon “ĉiuj estu politike liberigitaj”, por varti kontraŭrevolucionan restaŭran forton. En klasa socio, la liberiĝo de unu klaso sendube signifas novan subpremon al la alia. Lin Biaŭ volis liberigi la malamikojn de la diktaturo de la proletaro, tio signifas ke li volas repuŝi la centmilione nombrantan laborantan popolon de nia lando denove en la abismon de suferoj kaj mizero kaj kaŭzos perdon de kapo al miloj kaj miloj da homoj. Estas evidente, ke la slogano de Lin Biaŭ “restarigi la etiketon” signifas enlande restaŭri la malnovan ordon rompitan de la proletaro, restarigi la “paradizon” perditan de la ekspluata klaso kaj efektiviigi diktaturon de la grandaj bienuloj kaj de la grandaj burĝoj.

Prezidanto Maŭ montris: “La politikaj reprezentantoj de la grandaj bienuloj kaj grandaj burĝoj de

Ĉinio, kiuj estas malfortaj, povas fari nenion, eĉ ne ion malgrandan, sen mastro apoganta ilin post kuliso.” Por efektiviigi sian sonĝon de restaŭro, Lin Biaŭ nepre devis havigi al si iun imperiistan fremdlandan moŝton kiel sian postkulisan apoganton, kaj tiu mastro estas la sovetunia social-imperiismo. Kiam lia intrigo estis malkaŝita, li panike forfuĝis al sovetunia reviziismo kaj falmortis en Undur-Ĥan de Mongolio. Tiuj faktoj plene pruvis, ke la restaŭro de Lin Biaŭ signifas kapitulaci eksterlande al la sovetunia social-imperiismo por fariĝi reĝo de satelita lando sub la “nuklea ombrelo” de lia mastro.

Unuvorte, la intrigo de Lin Biaŭ por “restarigo de la etiketo” signifas restarigi la sistemon de ekspluatado kaj subpremado fare de la bienularo kaj burĝaro al la laboranta popolo, restaŭri la regadon de malmultaj homoj al la plejmulto, turni Ĉinion en kolonion de la sovetunia reviziismo kaj efektiviigi faŝisman diktaturon feŭdan kaj kompradoran.

La “sinrego” de Lin Biaŭ same kiel tiu de Konfucio havis la celon efektiviigi “restarigon de la etiketo”. Li postulis siajn ĝismortajn sekvantojn rigardi la “restarigon de la etiketo” kiel la plej gravan aferon kaj kontroli la proprajn parolojn kaj aktivadojn laŭ ilia “etiketo” por restaŭri kapitalismon; li ankaŭ avertis, ke ili ne malkaŝu sin tro frue por ne ruinigi la “gravan aferon” pro bagatelo, regu sin por “atente sinkaŝi”, “observu disciplinon” kaj submetu ĉion al la granda celo “restarigo de

la etiketo”, ĝuste kiel la kontraŭrevolucia kliko de Hu Feng, “akiru la eblecon de reviviĝo en tolerado de ĉio”, nome atendadu ŝancon por iutage atingi sian celon.

Tute ne estas hazarde, ke Lin Biaŭ turnis sin al la fantomo de Konfucio por heredi ties kontraŭrevolucian programon “sinregi por restarigi la etiketon”. Konfucio estis reakcia pensulo de la dekadenca klaso de sklavposedantoj. Pro tio ke la esenco de lia penso estis reveno al antikveco, konservativismo, regreso kaj restaŭro, spegulante la interesojn de ĉiuj dekadencaj ekspluatantaj klasoj, konforme al iliaj politikaj bezonoj, sekve ĉiuj reakciuloj kultas Konfucion. Kaj ankaŭ la slogano de Konfucio “sinregi por restarigi la etiketon” fariĝis ilia ideologia armilo por oponi kontraŭ reformo kaj por subpremi la popolon.

Ĝu Hi, reprezentanto de la reakciaj konfucianoj de Song-dinastio aktive faris proponojn al la feŭda imperiestro, dirante ke la slogano de Konfucio “sinregi por restarigi la etiketon” estas “la tuto de

perfekta doktrino de la ĉielo”, prenante ĝin kiel magian bastonon kapablantan protekti la reakcian regadon. Zeng Guofan, la hombuĉisto kiu subpremis la Revolucian Movadon de la Paca Ĉiela Regno, prenis la sloganon “sinregi por restarigi la etiketon” kiel radikalan kanonon direktantan ĉion kaj kuraĝigis siajn subulojn de ĉiuj rangoj “sinregi kaj ami la kunulojn” por riski la vivon por subpremi la popolan revolucion. La kontraŭpopola diktatoro Ĉiang Kajŝek prenis la saman sloganon de Konfucio kiel plej valoran trezoron kaj metis ĝin en la kuomintangan “Manlibron por Partiaj kaj Politikaj Laborantoj” kiel gravan principon de “fundamenta edukado” kontraŭ la komunistoj kaj la popolo en trejnado de faŝistaj bandoj. Li rigardis “la etiketon” kiel “spiritan nacidefendon” kaj “principon de stabiligo de la ŝtato” kun la vana espero emfazi “la etiketon” por firmigi “spiritan fundamenton por miloj kaj miloj da jaroj” por la Ĉiang-a dinastio. Tio ne estas mirinda ke Lin Biaŭ, same kiel la aliaj reprezentantoj de diversaj dekadencaj ekspluatantaj klasoj en la


Murgazeto de Kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio, starigita de petrolaj laboristoj en Cajdam-baseno de Kinghaj-provinco



historio, plenenergie distrumpetis la sloganon de Konfucio por uzurpi potencon de la Partio kaj restaŭri kapitalismon.

Kun "sinregi por restarigi la etiketon" kiel restaŭra programo, Konfucio klopodadis dum sia tuta vivo por restarigi la sklavan sistemon de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio antaŭ pli ol du mil jaroj. Hodiaŭ, sekvante Konfucion, renegato kaj naci-perfidulo Lin Biaŭ faris mortan batalon kontraŭ la proletaro por restaŭri kapitalismon, svingante la nigran flagon "sinregi por restarigi la etiketon". Lin Biaŭ estis vera disĉiplo de Konfucio: Ne nur lia penso similis al tiu de Konfucio, sed ankaŭ multaj el liaj vortoj estis prenitaj de Konfucio. Se la formortinta Konfucio povus scii, ke post 2,400 jaroj li ankoraŭ havos tian "superan" disĉiplon kiel Lin Biaŭ, li certe dirus kun ekzaltiĝo: Li estas vere mia inda disĉiplo, "kvankam mi aŭdis liajn vortojn, ne vidinte lian personon". (el *Lun Ju*)

Lin Biaŭ kaj Konfucio apartenas al unu sama ideologio komunikiĝanta inter si en ĉiuj spiroj; en politiko ili ambaŭ estis reakciuloj klopodantaj por restaŭro, regresado al malnovo kaj agi kontraŭ la historia fluo. Prezidanto Maŭ diris: "**Ĉiuj regresaj aktivadoj havos nur rezulton kontraŭ la volo de la farantoj, tute senescepte ĉu antikve aŭ nuntempe, ĉu enlande aŭ eksterlande.**" Konfucio agis kontraŭ la historia tendenco kaj ne povis savi la sklavan sistemon de pereco kaj fine fariĝis "malgrasa kaj elĉerpita kiel senhejma hundaĉo" kaj foriris al la forpasinta Ĝoŭ Gong kun sia granita kapo obstine strebanta por restaŭri la sklavan sistemon; kaj Lin Biaŭ ne nur ne povis realigi sian sonĝon restaŭri kapitalismon kaj starigi feŭdan kompradoran faŝisman dinastion, sed eĉ mortaĉis sen deca loko por enterigi sian korpon kaj foriris pilgrime al Konfucio kun la ĉifona flago "sinregi por restarigi la etiketon". Tio ĉi estas la neevitebla fino por ĉiuj restaŭraj fortoj.



LA DUA PONTEGO SUR JALUCANGPO-RIVERO

En la jaro 1966 la tibeta popolo konstruis la unuan pontegon sur Jalucangpo-rivero. Antaŭ nelonge la dua pontego — Gangka-ponto sur la malsupra parto de Jalucangpo-rivero — estis konstruita kaj malfermita al trafiko.

La pontego longas 416 metrojn kaj larĝas por trapaso de du kamionoj. Ĝi karakteriziĝas per naciaj trajtoj de Tibeto. La ponto ligas la ŝoseojn en la malsupra baseno ambaŭborde de Jalucangpo-rivero kaj ludas gravan rolon por la tibeta socialisma konstruado.

LA TUTLANDA SURGLACIA SPORTKUNVENO

En la Tutlanda Surglacia Sportkunveno de 1974, Ĝaŭ Vejĉiang, sportisto de Gilin-provinco, rompis la tutlandan rekordon de 10,000-metra sketkuro per 16 minutoj kaj 18.4 sekundoj.

La ĉifoja surglacia sportkunveno estis relative granda post la Liberiĝo. En ĝi partoprenis sume 24 teamoj inkluzive

de la provincoj Hejlonggiang, Gilin, Ŝenhi, Ŝanhi kaj Hebej, Aŭtonoma Regiono de interna Mongolio, Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono kaj Pekino. 408 gesportistoj el hanoj, koreoj, mongoj, manĉuoj, hujoj, ujguroj, ovenkeoj, dahuroj kaj aliaj nacimalplimultoj partoprenis en konkurso de sketkuro kaj artosketado. La knabaj sportistoj okupis 80% de la tuta sportistaro, kaj la knabaj artosketistoj ĉijare duobliĝis ol tiuj de la lasta jaro.

PUMPA KAJ KONSERVA GENERATORA KOMPLETO

En januaro ekfunkciis en Mijun-akvokonservejo de Pekino la unua pompa kaj konserva generatora kompleto projektita kaj fabrikita de nia lando mem.

Kiel nova hidroelektra ekipaĵo, la generatora kompleto povas ne nur produkti elektron sed ankaŭ pumpi akvon. Kiam oni havas superbezonan elektron, la generatoro povas funkcii kiel elektra motoro kaj la turbino kiel pumpilo, per tio oni povas revenigi la forfluitan akvon en la akvokonservejon por produkti elektron laŭbezone, tiel ke la hidroelektraj ekipaĵoj povas esti pli efike utiligataj.

Persisti en revolucio, oponi kontraŭ restaŭro

— Kritiko kontraŭ la krimoj de Lin Biaŭ, kiu distrumpetis la tezon
“Sinregi por restarigi la etiketon” por restaŭri kapitalismon

EN la verko “Alta Tajdo de Socialismo en la Ĉina Kamparo” nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris gravan instrukcion al nia Ĉengiaĝuang-a agrikultura kooperativo: “La nuna socialismo estas senprecedenca. Kompare kun la ‘klasikaj libroj’ de Konfucio, la socialismo estas nekalkuleble pli bona.” Kun la brila instrukcio de Prezidanto Maŭ kiel batalilo, ni senkompate kritikis la reakciajn pensojn predikatajn en la konfucianismaj “klasikaĵoj” kaj la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ; ligo kun la fenomenoj de la aktuala klasbatalo ni firme tenas la klasan kaj dulinian batalon, persiste iras la socialisman vojon, plenkore sekvas Prezidanton Maŭ en la revolucio kaj turnis nian mizeran vilaĝon de farmuloj en prosperan socialisman novan vilaĝon.

KRITIKI LA “KLASIKAJN LIBROJN” DE KONFUCIO KAJ PERSISTI EN SOCIALISMO

Kjufu estas la hejmloko de Konfucio. Je mencio de lia nomo ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj ĉiuj indigniĝas nedeteneble. Konfucio proponis siatempe, ke oni ‘sinregu por restarigi la etiketon’ kun la celo restaŭri sklavismon. Li kaj liaj disĉiploj kaj pradisĉiploj kriaĉis, ke “supera estas geniulo kaj malsupera stultulo”, kaj ke “kiuj laboras intelekte, devas regi; kiuj laboras fizike, devas esti regataj”. Tio signifas, ke subpremo kaj ekspluato al la laboranta popolo estas nature

justaj kaj pravaj. Jen kial ĉiuj agoniantaj reakciuloj de diversaj dinastioj en la historio laŭdaĉis Konfucion utiligane liajn reakciajn pensojn, por trompi, subpremi kaj ekspluati la laborantan popolon. Antaŭe nia vilaĝo Ĉengiaĝuang estis vilaĝo speciale por liveri milion al la pranepoj de Konfucio. En la malnova socio nia vivo estis multe pli amara ol galo. La rikoltitan milion ni devis transdoni al la pranepoj de Konfucio kaj restis al ni nur brano kaj sovaĝaj legomoj por vivi. La familio de malriĉkampano Ĉen Kingmu farmis iom pli ol 4 muojn da agro, la farmopago sole atingis 200 kg. da milio. Krom litro da milio prenita por ekzameni, ankaŭ la milio defalinta sur la teron dum konusa plenigo de la mezurilo, la farmulo ne rajtas repostuli. En 1939, kiam la milio estis baldaŭ rikoltota, hajlo plene detruis la rikolton. Oni ricevis neniom da greno el la kampoj, sed la pranepo de Konfucio ankoraŭ postulis plenan farmopagon. La avo kaj patro de Ĉen Kingmu sinpendigis unu post alia, lia patrino devis migri kun li kaj lia frato aliloken kiel almozuloj. Tiam 25 el la 58 familioj de nia vilaĝo forfuĝis aliloken por almozpeti, pli ol 60 homoj laboregis kiel jardungitoj aŭ taglaboristoj por bienuloj, 5 familioj forvendis sian infanon kaj 21 mortis aliloke pro malsato. Malriĉaj kamparanoj malamegis la nigrajn “klasikajn librojn” de Konfucio kaj kondamnis ilin kiel glavojn por mortigi sensangade. “La ‘klasikaj libroj’ nigraj kun krueleco lupa kaj tigra, faktorde argumentas kaj venenon rekomendas. De koler’ eksplodas malriĉuloj kun malfido ĉe ekvido.” Jen estas la sentimento de ni malriĉkampanoj kaj

malsuperaj mezkampanoj pri la “klasikaj libroj” de Konfucio.

En 1948 Kjufu estis liberigita kaj la ruĝa suno lumigis nian vilaĝon. Sub la eminenta gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ni sklavoj de Kong-familio kun plena klasa malamo kritikis la “klasikajn librojn” de Konfucio. Sekvante la socialisman vojon montritan de Prezidanto Maŭ, ni organizis nin en interhelpajn grupojn, poste fondis kooperativon kaj popolan komunumon sinsekve. Sur la sabla bordetendaĵo kie nenio kreskis antaŭe, ni formis 8 hektarojn da grenaj kampoj, plantis 70,000 porlignajn arbojn kaj 20,000 fruktajn arbojn. En aliaj 48 hektaroj da kampoj ni boris 21 maŝinputojn kaj ŝanĝis ilin en kampojn de stabila alta produkto. Nia brigado havas kamionojn, traktorojn, elektrajn motorojn, dizelojn kaj aliajn agrikulturajn maŝinojn. La grena produkto daŭre kreskas kaj nia kontribuo al la ŝtato pligrandiĝas jaron post jaro. Ekde 1969, ni ĉiujare impostpagas kaj vendas al la ŝtato meznombro 90 tunojn da greno, nome ĉiuj familioj preskaŭ po tuno. La vivo de la komunumanoj iom post iom pliboniĝas. Antaŭe en la vilaĝo estis nur 3 legosciantoj, nun la brigado fondis unu dekjaran lernejon, kaj ĉiuj lernaĝaj infanoj vizitas lernejon. Pli ol 120 studas en mezlernejo kaj 3 en supera lernejo. Pri ĉio ĉi la amasoj laŭdis per kanto: “En la vilaĝo staras etaĝdomoj kaj fabriko. L’ instrukci’ de Prezidanto Maŭ radias ruĝe; traktoroj kaj motoroj sur kampar’ funkcias muĝe; henas ĉevaloj, ĝojas homoj, sonas kant’ en daŭr’. Sur l’ etendaĵo verdas poploj kaj salikoj, peze kurbigis branĉojn piroj, pomoj kaj persikoj.”

Ŝanĝiĝis nia vilaĝo. La ŝanĝiĝo rezultiĝis el bataloj, kiel frukto de kritiko kontraŭ konfucianismo kaj reviziismo, kaj de persistado sur la socialisma vojo.

BATALO INTER RESTAŬRO KAJ KONTRAŬRESTAŬRO

De pli ol 20 jaroj, en antaŭenmarŝo sur la socialisma vojo, ĉiu paŝo estis plena de intensa batalo inter kulto al kaj opono kontraŭ Konfucio, inter restaŭro kaj kontraŭrestaŭro. La fokuso de la batalo koncentriĝas sur la baza problemo ĉu persisti en socialismo aŭ restaŭri kapitalismon.

En 1961, kiam ni brave marŝis antaŭen alte tenante la tri ruĝajn standardojn de la Ĝenerala Linio, granda impeto kaj popola komunumo, kaj la socialismaj aferoj senĉese akiris grandajn venkojn en ĉiuj flankoj, Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj iliaj bandoj, akordigante sin al la kontraŭĉinia ĥoro levita de imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj de diversaj landoj, senbride kalumniis, ke la Ĝenerala Linio, granda impeto kaj popola komunumo estas aplikitaj “tro arbitre”, “tro frue”, “fuŝe faritaj”, kaj samtempe kolportis reviziismajn varojn de “tri pliigoj kaj unu fikso”² kaj “kvar liberoj”³. Ili imitis la “sinregon por restarigi la etiketon” de Konfucio intencante restaŭri kapitalismon. En tiu tempo ili okazigis en Kjufu nigran kunvenon por rememorigi kaj kultu Konfucion. Ili varbis en la gubernio pli ol 100 bienulojn-muzikistojn, kaj rite kantis, muzikis, riverencis al Konfucio, flataĉe nomante lin “granda politikisto”, “pensulo”, “edukisto”, “unu el la plej grandaj personoj en la ideologia historio de nia lando”,



Kadroj kaj amasoj de kjufu-gubernio de Ŝandong-provinco indigne akuzas pri krimoj de Lin Biaŭ, kiu distrumpetis konfucianismon por restaŭri kapitalismon.

por fari kontraŭrevolucion restaŭran aktivadon per helpo de la doktrino de Konfucio kaj Mencio. Ankaŭ plenmano da klasaj malamikoj de Ĉengiaĝuang ekflaris la odoron kaj elrampis el diversaj anguloj por propagandaĉi la doktrinon de Konfucio kaj Mencio kaj kontraŭi la socialisman revolucion. Ili diris, ke “la heredita titolo ‘Jan Ŝeng Gong’ (Duko de Sanktula Posteulo) estis donita per imperiestra dekreto kaj eĉ imperiestroj kultis lin kiel majstron, eminentulo estas fine eminentulo”; kaj ke “la tamburistoj, surnaistoj⁴ kaj aliaj muzikistoj estis jam organzitaĵoj kaj poste ĉio devas iri laŭ la antikva sanktulo”. Ni praktikis diktaturon super plenmano da klasaj malamikoj, sed tiuj diris: “Ĉiuj kiuj portas saman familian nomon, estas parencoj kaj devas rilatiĝi intime kaj pace.” Ili kalumniis nin, ke ni malkonfesas niajn parencaĵojn. Kiam ni boris maŝinupon kaj transformis sablejon, ili diris, ke tio detruos la “*feng-ŝuj-on*” (terenon formon, kiu aŭguras prosperacon de la koncernaj personoj) kaj malobeas la “ĉielan destinon”, ktp. Ili prenis la doktrinon de Konfucio kiel normon por kulpigi min en dek punktoj kaj uzurpis la gvidantecon de la brigado. Tuj poste ili freneze subfosis la kolektivitan ekonomion. La subfosado multe malbonigis produktadon de la brigado kaj la produktokvanto reduktiĝis per du kvinonoj. Enpotenciĝo de la reviziismo signifas enpotenciĝon de la burĝaro. Tiel estis la rezulto!

Ĝuste en tiu kriza momento la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone prezidis la Dekan Plenon Sesion de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ellaboris la fundamentan linion de la Partio por la tuta historia periodo de socialismo kaj faris al ni la grandan alvokon “**nepre ne forgesu klasbatalon**”. La instrukcio de Prezidanto Maŭ kiel brila lumturo lumigis al ni la vojon. Ni ekkonis, ke la okazanta batalo estas batalo por kaj kontraŭ restaŭro, kaj batalo inter la du linioj ĉu praktiki marksismon aŭ reviziismon. Kune kun la vasta amaso de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, prenante la bazan linion de la Partio kiel armilon, ni forte kritikis la doktrinon de Konfucio kaj Mencio, kaj la kontraŭrevolucion reviziisman linion, disvolvante drastan atakon kontraŭ plenmano da klasaj malamikoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj indigne diris: “La doktrino de Konfucio kaj Mencio ja estas doktrino por ekspluato, subpremo kaj regreso. La celo de plenmano da klasaj malamikoj predikantaĵoj la doktrinon de Konfucio kaj Mencio ja estas renversi la diktaturon de la proletaro kaj

restaŭri kapitalismon.” Post intensa batalo ni reprenis la gvidantecon. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj decidis plej rapide restarigi kaj disvolvi produktadon. “Kiam homoj unuecigas sian volon, eĉ monto cedas la lokon.” Post unu jaro la pomua produktokvanto de greno duobliĝis de 150 kg. en 1962 al 300 kg. Ankaŭ aliaj produktoj multe progresis.

FIRMIGO KAJ DISVOLVADO DE LA GRANDAJ FRUKTOJ DE LA GRANDA PROLETA KULTURA REVOLUCIO

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, kune kun laboristoj kaj la ruĝaj gvardianoj, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj malkovris kaj kritikis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, forbalais la malnovan penson, malnovan kulturon, malnovajn morojn kaj malnovajn kutimojn dissematajn de la “klasi-kaj libroj” de Konfucio, kio edukis kadrojn kaj hardis amasojn. Sed Lin Biaŭ kaj lia bando denove imitis “sinregon por restarigi la etiketon” de Konfucio, skribante 4 rulpendaĵojn en mallonga tempo kun la surskribo: “El ĉiuj aferoj la plej grava estas nur tio: Sinregi por restarigi la etiketon.” Ili neprokrasteble volis renversi la diktaturon de la proletaro kaj restaŭri kapitalismon. Ili plenenergie atakis la Grandan Proletan Kulturajn Revoluciojn kaj kalumniis novajn aferojn el ĝi rezultintajn, arogante intencante retroirigi la historion. Ekzemple, Lin Biaŭ kalumniis kiel “formon de labordevigo” la vojon, kiun sekvis la intelektaj junuloj laŭ la alvoko de Prezidanto Maŭ iri al la kamparo por kombiniĝi kun la laboristoj kaj kamparanoj, kaj kiel “alian formon de senlaboreco” la vojon, kiun sekvis la kadroj laŭ la instrukcio farita de Prezidanto Maŭ en la 7-a de majo, 1966. Tiuj absurdaĵoj de Lin Biaŭ estas simplaj kopioj de la reakcia prediko de Konfucio kaj Mencio: “Kiuj laboras intelekte, devas regi; kiuj laboras fizike, devas esti regataj.” Krome, kiam ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj administras la lernejojn kaj plenumas la instrukcion de Prezidanto Maŭ, ke la lernantoj kaj lernas kaj laboras fizike, iuj ekbabilaĉis ke “tio malordigas la sistemon de edukado kaj lernado”, “estas nenio komuna kun deca edukado” kaj “reduktas la edukkvaliton”. Tiaj kalumnioj treege indignigis nin.

Ĉio ĉi tio estis esprimo de batalo inter la du klasoj kaj du linioj. Ni devas firme batali kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Lin Biaŭ kaj nepre subigi tiun reakcian pensflon de regre-

sado. Ni serioze studas la verkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ, kritikis la krimojn de Lin Biaŭ kaj lia bando en subfosado de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj kritikis la tezojn de Konfucio kaj Mencio: “Kiuj laboras intelekto, devas regi; kiuj laboras fizike, devas esti regataj” kaj “fariĝi burokratoj post sukcesa sinklerigo”. Per faktoj ni faras rezonadon kaj prikantas la grandajn venkojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio, energie firmigas kaj disvolvas ĝiajn grandajn sukcesojn kaj aktive subtenas la novajn aferojn de socialismo. Lin Biaŭ atakas la iron de intelektaj junuloj al kamparo; ni multe faras laborojn pri tiuj intelektaj junuloj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: politike prizorgi ilin kaj kuraĝigi ilin en kombinado kun laboristoj kaj kamparanoj; plene disvolvi ilian rolon en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, instigi ilin sperti pluvon kaj ventegon en la vasta mondo de la kamparo kaj ŝarĝi ilin per laboroj taŭgaj por ili; en ĉiutaga vivo prizorgi ilin, eduki ilin lukti en malfacilaj kondiĉoj kaj vivi en laboremo kaj ŝparemo. El la pli ol sepdek intelektaj junuloj fikse loĝantaj en nia brigado la plejparto havas grandan progreson: 3 el ili aliĝis al la Partio, 18 aliĝis al la Komunisma Junulara Ligo kaj 2 partoprenas en la gvida laboro de la Revolucia Komitato de nia produkta brigado. Ju pli Lin Biaŭ atakis la partoprenon de kadroj en fizika laboro, des pli firme ni sekvas la vojon indikitan en la “instrukcio de 7 majo” kaj aktive partoprenas en la kolektiva produkta laboro por ĉiam konservi ĉe ni la originan naturon de laboruloj. En 1972, la 15 ĉefaj kadroj de nia brigado meznombro laboris surkampe 315 tagojn. Cetere, ni serioze zorgas pri la administrado de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al la lernejoj

por efektivi la “instrukcion de 7 majo” faritan de Prezidanto Maŭ. La lernantoj ricevas klarecon, sciencajn sciojn en la lernejo unuflanke, kaj faras produktajn laborojn aliflanke, kaj lernas politikan teorion el libroj, kaj partoprenas en klasbatalo en la socio, kritikante burĝaron kaj reviziismon. Multaj lernantoj estas aktivuloj kuraĝaj en klasa batalo kontraŭ la malamikoj; en la sezono okupata de kampaj laboroj ili estas ankaŭ sturmaj fortoj en agrikultura produktado, scipovante direkti traktoron kaj manipuli plugilon tiratan de bovo. La fakto pruvis, ke la fizionomio de la lernejoj tute ŝanĝiĝis post administrado de la lernejoj fare de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tio estas forta kritiko kontraŭ la neado de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj strangolado de socialismaj novaĵoj fare de Lin Biaŭ kaj lia bando.

Lin Biaŭ estis centpocenta disĉiplo de Konfucio. Ni nepre kondukos la batalon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio ĝis la fino! Ni firme persistos en revolucio kaj oponos kontraŭ restaŭro, firme daŭrigos antaŭeniron kaj oponos kontraŭ regreso!

1. Ĉen Jimej, sekretario de la partia filio de Ĉengiang-brigado de Kĵufu-gubernio, Ŝandong-provinco.
2. Plivastigo de parceloj por privata uzo, plivastigo de liberaj merkatoj, pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mas-trumado
3. Libero de uzuro, libero de dungo de laboristoj, libero de vendo kaj aĉeto de tero kaj libero de privata entreprenado
4. Surnao estas blovinstrumento.

Kong Hiangjong, malriĉkamparanino kun aĝo de 79 jaroj kune kun batalantoj de ĈPLA kritikis Lin Biaŭ kaj Konfucion en la “Domo de Konfucio.” Ŝi indigne akuzas pri kruela ekspluatado de bienuloj de la “Domo de Konfucio” al la laboranta popolo. Kiam kvarmonata estis ŝia filo, ŝi jam devigite mannutris tie bienulidon.





Filmo “Fajraj Jaroj”



Ĝaŭ Sihaj tre indigniĝas, vidinte pecon de nenorma "speciala aloja ŝtalo" envolvitan en papero, kiun la t.n. "socialisma lando" vendis al ni kiel norman. Li decidas iri sian propran vojon en disvolvado de industrio kaj gajni honoron por la patrolando sekvante la "Ĉarton de la Anŝana Ferŝtala Kompanio" sankciitan de Prezidanto Maŭ.



Ĝaŭ Sihaj vizitas Majstron Tian — emeritan laboriston spertan pri afinacio.



La afinacia grupo kun Ĝaŭ Sihaj kiel ĝia ĉefo decidas rompi la ekonomian blokadon de la moderna reviziismo. Ĝi elmetas provan projekton por afinacii specialan ŝtalon per alĵo produktita de nia lando mem anstataŭ la importita kaj tio ricevas aprobon de la laboristoj.



En la kunveno de la partia komitato Ĝaŭ Sihaj emocie diras, ke ni devas meti nian starpunkton sur memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj en revolucio.



Sihaj kaj liaj kolegoj ĉiam sin kuraĝigas per instruoj de Prezidanto Maŭ, ki- am ili renkontas mal- facilojn en la prova afinacio de la aloja ŝtalo.



La sekretario de la partia komitato de la Ŝanhaja Ferŝtala Fabriko Vang Gian firme subtenas Ĝaŭ Sihaj en afinacio de speciala aloja ŝtalo per materialoj produk- titaj de nia lando kaj kuraĝigas lin an- taŭenmarŝi kontraŭ malfaciloj per instru- ojn de Prezidanto Maŭ.




Akceptinte la taskon
Sihaj kaj liaj kolegoj
komencis provan afi-
nacion.



La sekretario de la
partia komitato de la
fabriko Vang Gian
kritikas fabrikestron
Baj ke li deviiis de la
Ĝenerala Linio de la
Partio.




Sihaj dumane prezentas al la fabrikestro ĝojigan informilon pri inspektado de Prezidanto Maŭ al la fabriko, grandaj instruoj de Prezidanto Maŭ kaj ankaŭ decido de la laboristoj.



Dank' al la eduko en praktiko fabrikestro Baj rekonis sian eraron. Li kune kun laboristoj kaj la ĝenerala inĝeniero observas fajron de la forno.



En la brila tago de la kvara datreveno de inspéktado de Prezidanto Maŭ al la fabriko, la grupo de Ĝaŭ Sihaj faris ĉiun preparon por la prova afinacio kaj malgranda Ĝaŭ, ŝtal-laboristo de la nova generacio akceptas torĉon por ekbruligi la fornon.



Venas la tago, en kiu oni produktas ŝtalon por gajni honoron al la patrolando.



La aloja ŝtalo produktita de la ĉinaj laboristoj dank' al Maŭzedongpenso kaj sinapogo sur propraj fortoj



Laŭ la invito Ĝaŭ Sihaj, sekretario de la partia komitato de la fabriko Vang Gian kaj fabrikestro Baj partoprenas en prova navigado de novaj militŝipoj, kiuj estas fabrikitaj per la aloja ŝtalo produktita de nia lando.

La 33-a familio

ANTAŬ kvin jaroj, transloĝiĝis nova familio al Maŭgiaŝan-a produkta brigado de Pinglu-gubernio de Ŝanhi-provinco, kaj tiel ĝi fariĝis la 33-a familio en tiu brigado. La granda familio havas 31 membrojn kaj ĝia "familiestro" estas instruisto Haŭ Guanggie.

Antaŭ nelonge ni vizitis la familion.

DEVENO DE LA 33-A FAMILIO

Enirinte Maŭgiaŝan-vilaĝon ni trovis kavernajn domojn kun larĝa korto plena de sunbrilo. Ĉirkaŭ la korto troviĝas dormĉambroj, manĝejo, legoĉambro, porkejo, kokejo k.a.

La "familiestro" diris al ni ridante: "Mi parolu pri nia familio de la komenco."

Estis decembro de 1968. Kiam Prezidanto Maŭ publikigis la gravan instrukcion "**La intelektaj gejunuloj iru al la kamparo**", revoluciaj lernantoj kaj instruistoj de Vandoŭ-mezlernejo de Tiangin, kiel tiuj de la aliaj urboj de la tuta lando, vigle respondis la alvokon de Prezidanto Maŭ kaj firme decidis iri al la kamparo, eĉ al la plej malfacila loko, por akcepti reedukon ĉe malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ĝuste tiam venis al la nomita mezlernejo du kadroj de Pinglu-gubernio por akcepti tiujn intelektajn gejunulojn. Ili diris al la lernantoj: "Bonvole iru al Pinglu." Sed la junuloj diris: "Al Pinglu (ebena tero) ni ne iros, ĉar tie la tero estas ebena kaj kondiĉoj bonaj!" La kadroj diris: "Vi ne scias, ke ne ebena estas Pinglu. Ĝi tre famas pri trimil valoj, multaj montoj kaj ŝtonoj, la kondiĉoj estas tre malfacilaj. Ni atendas vian alvenon!" La junuloj diris: "Do ni iru tien."

Post preparo de mallonga tempo, tridek intelektaj gejunuloj gvidataj de instruisto Haŭ ekmarŝis al Pinglu-gubernio pli ol 1,000 kilometrojn malproksima. Pli ol cent mil urbanoj de Tiangin adiaŭis ambaŭflanke de stratoj ilin kaj la aliajn

intelektajn gejunulojn irontajn al kamparo. Sekretario de la partia komitato de distrikto, kiu partoprenis en la Longa Marŝo de 25,000 lioj, akompanis ilin longan distancon kaj fojerefoje elkore diris al ili: "Vi nepre devas iri laŭ la brila vojo montrita de Prezidanto Maŭ ĝis la fino!"

Post kelkaj tagoj ili atingis la ĉefurbon Pekinon. Sur Tian-anmen-placo ili ĵuris antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ por montri sian firman decidon kaj memfidon konstrui la novan socialisman kamparon. Kaj tie ili ricevis karajn donacaĵojn de gardistoj ĉe Ĝongnanhaj: botelon da akvo de Ĝongnanhaj, saketon da tiea tero kaj paketon da helianta semo tie rikoltita, per kiuj la gardistoj esprimis sian deziron, ke ili enradikiĝu, floru kaj fruktu en la kamparo.

Survoje la junuloj vizitis kun respekto la tombon de la internaciisma batalanto Doktoro Bethune, la hejmlokon de Liu Hulan, heroino sinoferinta en la Liberiga Milito, kaj la faman Daĝaj-brigadon. Ĉio ĉi tio profunde impresis ilin. Ili decidis vivi kaj batali same kiel la revoluciaj antaŭuloj.

En la 14-a de februaro, 1969, ili atingis Maŭgiaŝan-vilaĝon post marŝo sur monta vojo. Kiam ili enpaŝis la vilaĝon, ilin varme ĉirkaŭis bonvenigantaj komunumanoj kun tamtamoj kaj tamburoj. Iu avino diris ridante: "Certe bone ŝanĝiĝos Maŭgiaŝan dank' al tio ke Prezidanto Maŭ sendis al ni tiujn ĉi junulojn!"

LA UNUA LECIONO

Post la alveno al la vilaĝo prezentiĝis antaŭ la junuloj arda batala vivo.

La partia filio kaj maljuna malriĉkampano Onklo Maŭ Hingtang tre zorgis politikan kreskon de la junuloj. Li pensis, ke Prezidanto Maŭ komisiis al ni kulturadon de la junuloj, do ni devas doni



Intelektaj gejunuloj kune kun malriĉkamparanoj faras projekton pri la estonta konstruado de Maŭgiaŝan.

multe da zorgo al ili por ke ili havu firman starpunkton de la proletaro. Por atingi la celon la partifilia sekretario kaj Onklo Maŭ rakontis per kelkaj vesperoj al ili la klasbatalan historion de la vilaĝo. Ili diris al la junuloj: “Vi devas firme memori la instruon de Prezidanto Maŭ ‘nepre ne forgesu la klasbatalon’.”

Poste Onklo Maŭ gvidis ilin trairi la montvilaĝon por ke ili konu klasan apartenecon de ĉiuj familioj de la vilaĝo. Kiam ili venis al salikoj kreskantaj ĉe la fino de la vilaĝo, Onklo Maŭ diris al la junuloj: Tiuj arboj estis plantitaj en la jaro 1953, kiam malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sin organizis en kooperativon, tial oni nomis ilin “kooperaj salikoj”. De tiam la kooperativanoj solide unuiĝas kaj decideme iras laŭ la socialisma vojo montrita de la Partio. Li Fukuj, maljuna ekssekretario de la partia filio de la vilaĝo, suferis de grava malsano kaj petis siajn filojn porti lin por rondiri kaj rigardi plantaĵojn en kamparo. Li admonis aliajn bone konstrui Maŭgiaŝan laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ. Onklo Maŭ parolis ankaŭ pri amo de maljuna malriĉkamparano Li Hin-ju al la kolektivo. Li diris emocie: “Ĉu tiaj maljunaj malriĉkamparanoj ne estas fidindaj? La hodiaŭa prospero de la montvilaĝo estas atingita tute dank’ al la penega laboro de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.” Per tiuj vortoj li admonis la junulojn firme starigi la penson

de sinapogo sur malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Tiu kortuŝa eduko pri klasbatalo kaj linia batalo multe altigis la konscion de la junuloj en ideologio kaj politiko. Sub la gvido de la partia filio ili kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj senmaskigis iun malamikon kaŝiĝintan pli ol dudek jarojn kaj malkovris la kazojn de mortigo al tri revoluciaj kadroj okazintajn antaŭ kaj post la agrara reformo. Vidante sanan kreskon de la junuloj la malriĉkamparanoj kaj masuperaj mezkamparanoj sentis sin ĝojaj.

Instruisto Haŭ diris al ni, ke de post tiam la junuloj solvas ĉiajn malfacilojn kaj problemojn sin apogante pli strikte sur la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, memkonscie akceptas reedukon de ili kaj decidis transformi Maŭgiaŝan kune kun ili.

ŜANĜI MAŬGIAŜAN EN DAĜAJ

En la kavernoĉambro de instruisto Haŭ pendas mapo de “dekjara reforma projekto de Maŭgiaŝanbrigado”. Fingromontrante la mapon la instruisto rakontis al ni: En la malnova socio la sterilaj ŝtonozaj kampoj en valoj kaj sur montoj ofte suferis de ventego kaj sekeco. Post la Liberiĝo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj fariĝis mastroj de sia sorto kaj iris sur la kolek-

tivan vojon, sed la produkto disvolviĝis malrapide pro subfoso de la reviziisma linio de naciperfidulo Liu Ŝaŭki “konstrui ebenaĵojn, forlasi montregionojn”.

Aŭskultinte proponojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la intelektaj gejunuloj faris firman decidon “ŝanĝi Maŭgiaŝan en Daĝaj”. Ili profundiĝis en la amasojn por fari enketon kaj tiel ili ellaboris la dekjaran reforman projekton de Maŭgiaŝan-a produkta brigado kune kun tiuj kamparanoj.

Tamen, la junuloj komprenas: La bela idealo efektiviĝos nur post tre malfacila laborado. Sub la gvido de la partia filio komenciĝis la konstruado de la montvilaĝo.

Akvo estas ŝlosilo por Maŭgiaŝan en disvolvo de agrikulturo. De multaj jaroj tie ne troviĝis irigaciata kampo, kaj trinkakvon oni devis elĉerpi ĉe fundo de valo profunda je kelkdek metroj. Post la Liberiĝo, solvita estis la problemo de trinkakvo, sed oni havis neniom da irigaciata kampo. La intelektaj junuloj decidis solvi la problemon. Post multfoja esploro kune kun spertaj maljunaj

kamparanoj ili elmetis proponon “tuneli Hejniu-monton kaj konstrui irigacian kanalon ĉirkaŭ montoj”. Tio ricevis aprobon de la partia filio. Tiam iuj diris, ke estis multaj malfaciloj kaj granda danĝero en borado de Hejniu-monto kun tre malmola ŝtono, tial oni ne agu senpripense. Ĝuste en tiu tempo la filmprojekcia grupo de la komunumo venis al la vilaĝo por prezenti filmon *La Kanalo Ruĝa Flago*. La revolucia spirito de Linhian-aj popolanoj en konstruado de la kanalo sur la montoj multe kuraĝigis la junulojn. Ili diris: “Linhian-aj popolanoj povis trabori Tajhang-monton, kaj ankaŭ ni certe povos trabori Hejniu-monton!” La sekvantan tagon, sturma taĉmento ĉefe el la intelektaj junuloj venis al Hejniu-monto. Komenciĝis la batalo kontraŭ la monto. Ili lernis modeste kaj faris ripetadan praktikon por ellerni faradon de mintruo, kaj mem produktis dinamiton, kiam ĝi mankis al ili. La partia filio tuj sendis homojn por instali aerumajn ekipaĵojn, ĉar ju pli profunden iris la fosado, des pli malfacile estis elporti la eksplodigitajn ŝtonetojn el la tunelo pro tio, ke la fumo ne povis eliĝi. Sub la helpo de laboristoj de proksima minejo, ili finis la fosadon de 367-

Intelektaj gejunuloj serioze studas verkon de Prezidanto Maŭ.





Intelekta junulino Ding Gujŝong, vicsekretario de la partia filio de la brigado, lernas de la grupestro teknikon pri semado.

metran kanalon en la monto — la ĉefan parton de la irigacia sistemo.

Maŭgiaŝan-vilaĝo posedas 60 hektarojn da kampoj kiuj dislokiĝas sur la montodeklivoj. En la pasinteco, la kampoj donis neniom da greno, kiam ili trafis sekecon aŭ diluvon. Por ŝanĝi tian fizionomion la junuloj kaj la komunumanoj komencis reformadon de la valoj kaj montodeklivoj. Post laboro dum unu vintro formiĝis ŝtuparaj kampoj sur la montodeklivoj. Foje, kiam ili konstruis barajon por plivastigi kampojn, monta torentego breĉis la ĵus konstruitan digon, kio minacis la tutan barajon. Tiam tuj alrapidis komunumanoj laborantaj en proksimaj kampoj por helpo. Instruisto Haŭ, unuaveninta, sin ĵetis en la akvon kaj per sia korpo ŝtopis la breĉon. Post streĉa batalo la digo estis bone konservita. Tiamaniere ili konstruis kvin hektarojn da Daĝaj-tipaj kampoj en kelkaj jaroj kaj ordigis pli ol 13 hektarojn da kampoj,

kiuj antaŭe malbone konservis al si akvon, grundon kaj sterkaĵon. Ankaŭ aliaj kampoj estis riparitaj. Tio kreis favoran kondiĉon por disvolvi agrikulturan produkton.

En la jaro 1970, venis la novaĵo ke la supera instanco donis al Maŭgiaŝan altensiajn fadenojn por havigi elektron al la vilaĝanoj, kiuj ĉiam lumiĝis al si per kerosena lampo en la pasinteco. La intelektaj junuloj vigle sin anoncis por partopreni en instalado de fadenoj. Ili kune kun laboristoj mezuris la linion kaj starigis elektrofadenajn fostojn, tiel ke la elektrofadenoj atingis la montvilaĝon trans kvar valoj kaj tri montoj. De tiam en la vilaĝo brilas elektra lampo, aŭdiĝas disaŭdigo, efektiviĝis mekanikigo kaj duonmekanikigo en draŝado, muelado, dispecigo, sensenigo de kotono k.a. Dank' al tio multe liberiĝis laborfortoj por agrikulturo.

En la produkta praktiko la intelektaj junuloj aplikis sciencan metodon en terkulturado, enkondukis bonkvalitajn speciojn kaj disvastigis novan kulturan metodon de maizo. Krome, ili profunde plugis, faris plantadon laŭ racia denseco kaj zorgan mastrumadon de plantoj en kampo. Dank' al tio la totala produktokvanto de greno de Maŭgiaŝan duoble kreskis en tri jaroj. En 1973, ili akiris senprecedencan bonan rikolton post venko de grava sekeco. Instruisto Haŭ diris ridante: “Nia dekjara projekto jam estis parte efektivigita kaj estos tute efektivigita post kelkaj jaroj.”

SANA KRESKO

En la kvin jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj edukado de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, la tridek intelektaj junuloj sane kreskas en la tri grandaj revoluciaj movadoj. Onklo Maŭ Hingtang ĝoje diris al ni: “Tiuĵ junuloj profunde enradikiĝis en nia Maŭgiaŝan kvazaŭ la grandaj salikoj ĉe la fino de la vilaĝo.”

Ni prenu Ĝang Ĝenĝong kiel ekzemplon. Li estis ironta al la armeo por militservo. En la adiaŭa kunveno kamarado Ĝang diris emocie: “Mi kreskas dank' al edukado de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Maŭgiaŝan. Maŭgiaŝan ja estas mia hejmo kaj mi revenos ĉi tien post militservado.” Li foriris, sed restigis sian litaĵon kaj donis sian ŝparitan monon de 80 juanoj al la produkta brigado. Poste la partia filio decidis aĉeti 500 fruktarbidojn per

lia mono kaj planti ilin malantaŭ la vilaĝo. Hodiaŭ la fruktarboj kreskas prospere.

La estro de la longmarŝa grupo Ĝu Ginji nun fariĝis pli kapabla kaj pli matura. En 1971, li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, kaj nun laboras kiel vicsekretario de la komitato de la Komunisma Junulara Ligo de Pinglu-gubernio. Li ofte diris: “Kelkjara sinhardo en kamparo havigis al ni firman bazon por la estonta revolucia vojo. Ni faros kontribuon por la socialisma afero, nur se ni ligos nin mem kun la revolucia afero.” Kvankam li jam foriris de Maŭgiaŝan, tamen li ĉiam sopiras kaj ofte venas al la vilaĝo por viziti siajn kunbatalantojn.

Ding Gujĵong funkcias kiel partifilia vicsekretario de la brigado, membro de la konstantaj komitatoj de la komitatoj de la Komunisma Junulara Ligo de Junĉeng-subprovinco kaj Pinglu-gubernio kaj membro de la komitato de KJL de Ŝanhi-provinco. Menciante pri ŝi ĉiuj Maŭgiaŝan-anoj ridis pro tiu afero: Antaŭ kvin jaroj ŝi demandis: “Kie kreskas akvomelona arbo?” Hodiaŭ ŝi jam fariĝis kompetenta kadro. Ŝi okupiĝas pri

multaj kunvenoj, sed reveninte post la kunveno, ŝi ĉiam iras al kampo por partopreni en fizika laboro. Pro tio ŝi estas laŭdata kiel laborema junulino.

Sur la montodeklivo oni ofte vidas junulon, kiu laboras tie kaj sin vestas en helblua jako. Li estas neniu alia ol la instruisto Haŭ Guanggie. Nun li laboras kiel la partifilia sekretario de la brigado, vicsekretario de la partia komitato de la komunumo, membro de la partiaj komitatoj de Pinglu-gubernio kaj Junĉeng-subprovinco. Tion vidane iuj diris: “Kamarado Haŭ ne povos longe resti en nia Maŭgiaŝan!” Sed li diris: “Mi devas ricevi reedukon, ĉar mi estas intelektulo; kaj mi devas daŭrigi la revolucion, ĉar mi estas komunisto. Mi amas Maŭgiaŝan. Mi devas ĉi tie lukti por komunismo la tutan vivon.” En 1972 li edziĝis kun montregiona instruistino, kaj lia hejmo sin lokas en la korto de la intelektaj junuloj.

Hodiaŭ najbaraj montanoj laŭdis la intelektajn gejunulojn de Maŭgiaŝan, ke ili estas bravuloj. Oni diris: “Ni ja trankviliĝis, ke ni havas tiajn junulojn kiel daŭrigantojn de la revolucia afero.”

Intelekta junulo Song Ĉunjuan (dekstre) fariĝis produkta grupestro. Jen li kune kun komunumanoj faras eksperimenton pri kulturado de bonkvalitaj semoj de tritiko.



Jutkore servi al la konsumantoj

— Pri faroj de la Kvina Prestinktura Fabriko de Ŝanhajo por altigi la kvaliton de flordesezna katuno

LA flordesezna katuno produktita de la nomita fabriko estas laŭdata de en- kaj eksterlandaj konsumantoj pro ĝiaj belega kolorriĉa desegnaĵo kaj bonkvaliteco; sed precipe laŭdinda estas la revolucia spirito de la laboristoj kaj teknikistoj de la fabriko por servi al la konsumantoj ĉiamaniere laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ pri tutkora kaj tutanima servo al la popolo.

ZORGEMA PROJEKTADO

Ni vizitis la nomitan fabrikon. Kiam ni eniris en la desegnaĵprojektan ĉambron, ni estis sorĉitaj de multaj bildalbumoj. Projektistoj diris al ni, ke ĉiujare la fabriko sendas ilin al pitoreskaj lokoj

fame konataj en la tuta lando por fari fotografaĵon kaj skizadon kaj per tio ili akiris grandan kvanton da viveca materialo utila por projekti desegnojn de ŝtofo. Kaj ili estas ofte senditaj ankaŭ al fabrikoj, vilaĝoj kaj magazenoj por peti proponojn de laboristoj, kamparanoj kaj aliaj konsumantoj pri flordesezna katuno, kio riĉigis ilian projektan penson.

Parolante pri sia sperto en projektado Ĝang Hjueking menciis jenan okazaĵon.

Foje, ŝi iris en kamparon por sperti tiean vivon. Kamparanoj ĝenerale postulis ke oni multe projektu katunon kun flordeseznaĵoj ŝatataj de ili. Ĝang Hjueking ricevis novan ideon de tio kaj de tiam ŝi ofte pensis en si, per kia flordesezno kon-



Projektado

tentigi la kamparanojn. Foje ŝi hazarde vidis ekranon kun bildo el plumoj, en kiu versimila blanka pavo profunde impresis ŝin. Ŝi pensis, ĉu estas eble krei novan vivplenan desegnon kun pavoj kaj peonioj plaĉaj al kamparanoj? Ŝia ideo ricevis subtenon de la gvidantoj. Helpate de aliaj projektistoj Ĝang Hjueking faris desegnon kaj multfoje iris al kamparanoj por peti de ili opiniojn kaj fari plibonigojn. Por ke la desegno konformu al la postuloj de prestinkturado, ŝi ankaŭ fojerefoje petis opiniojn de laboristoj kaj teknikistoj en laborejoj kaj finis tiun projektadon post 16-foja reformo.

Tiu desegnaĵo en brilaj koloroj kaj kun harmonia strukturo aspektas tiel vivplena, ke la blankaj pavoj en diversaj pozoj inter florantaj peoniaroj ŝajne deziras elflugi. La ŝtofo kun tiu desegno estis tre bone akceptata de la kamparanoj dum prova vendo. En la tutlanda kunveno por fiksi la produktokvanton de flordesegna katuno pli ol 1,000,000 metroj de la ĉirita katuno estis menditaj. Ĝang Hjueking diris kun profunda kompreno: Verko fontas el la vivo. Se mi ne konus la volon de la kamparanoj, mi ja ne povus fari tian desegnaĵon.

En la pasintaj kelkaj jaroj la projektistoj de la fabriko faris nemalmultajn similajn desegnojn kun klara nova artstilo kiuj estas bonvenaj al la konsumantoj.

SERIOZECO EN PRESTINKTURADO

Estas malfacila afero precize surtoligi la desegnaĵojn zorge pentritajn de projektistoj. Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ ke **“ĉiu aĵn produktaĵo devas esti ne nur multa sed ankaŭ bonkvalita kaj taŭga por longa uzado”**, la laboristoj kaj teknikistoj de la fabriko ĉiam metas la kvaliton en la unuan lokon en prestinkturado, en la pasintaj dekkelkaj jaroj.

Diversaj estas la ŝtofaj flordesegnoj kaj variaj estas la nuancoj de iliaj koloroj. Por bone prestinkturi la desegnojn sur kotonŝtofo kaj kotonpoliesteraj teksaĵoj kun dezirata efiko, antaŭ ĉio oni devas elekti taŭgajn tinkturojn. Kamaradoj de la fabriko sciigis al ni, ke kun senĉesa disvolviĝo de la tinktura industrio de nia lando oni faris pli ol 20 provojn respektive al ĉirkaŭ 250 ofte uzataj koloriloj de 6 specoj kaj starigis arkivojn por ili. La fabriko klare difinis, ke ĝi uzas en la produktado nur kolorilojn kiuj atingis la normojn de la ŝtato.




Pakado de produktaĵoj

Pasintjare por prestinkturi koton-poliesteran teksaĵon, la fabriko trovis ke mankis materialo pri unu el la normoj de la elektita tinkturo. Ili paciencie serĉadis ĝin kaj finfine helpate de la urba ŝpinteksa instituto trovis ĝin post foliumado de 16-jara teknika arkivo. Bedaŭrinde, la trovita normo estis nekontentiga. Kaj por bone servi la konsumantojn la fabriko decidis ne uzi tiun tinkturon.

La fabriko estas rigora tiel en prestinkturado kiel en elektado de tinkturoj.

Foje, la fabriko produktis urĝe bezonatan flordesegnan katunon por eksterlanda merkato. La



Serioza prestinkturado

flordeseĝaĵo estis aparte delikate gravurita kaj pro tio la prestinkturado estis multe pli malfacila ol la ordinara. La efiko de la unua provo estis nekontentiga. La gvidantoj de la fabriko diris, ke la produktaĵo de ilia fabriko koncernas la reputacion de la patrolando, tial ili devas garantii la kvaliton kiel ajn urĝa estas la tasko. Kune kun teknikistoj ili venis al la prestinkturaj maŝinoj kaj ekzamenis kune kun laboristoj la diversajn procedojn kaj fine trovis la kaŭzon de la malbona produkto. Tuj post tio la flordeseĝa katuno estis prestinkturita bonkvalite kaj estis bonvena al eksterlandanoj. Post nelonge la fabriko denove ricevis mendon de tiu ĉi ŝtofo. Sui la bazo de la akirita sperto ili plibonigis sian procedon, pluaparte altigis la kvaliton de la produktaĵo kaj la flordeseĝa tinkturaĵo estis elektita de la administracio de eksterlanda komerco kiel elstara ekzemplo.

RIGORA KONTROLADO

Antaŭ sia ekspedo la produktita flordeseĝa katuno devas esti senescepte kontrolita en speciala laborejo. Inter ties laboristoj cirkulas jena diro: “La postuloj de la konsumantoj estas la normoj



Projektistoj kolektas opiniojn de kamparanoj pri flordeseĝa katuno.

por kontrolado de la produktaĵoj.” Ili ja klopodas por efektiviĝi sian promeson.

Iu respondeculo de la laborejo prezentis al ni ekzemplon pri rigora kontrolado de kontrolistino Kin Mejgju.

Iun fojon, dum kontrolado Kin Mejgju trovis kelkajn flavajn makuletojn sur nigrebruna florde-segna prestinkturaĵo surŝutitajn de rulilo de la prestinktura maŝino al la katuno. La tre malgrandaj makuloj estis malfacile rimarkeblaj kaj ne influis ĝian belecon. Tia produktaĵo povis esti rigardata kiel bonkvalita laŭ la difinita normo. Sed Kin Mejgju konsideris, ke atentemaj konsumantoj certe malĝojos aĉetinte tian ŝtofonaĵon kaj ŝi ne devas ellasi tian produktaĵon. Ŝi diris sian opinion al gvidanto de la laborejo kaj la lasta tre atentis pri la problemo. Ĉu troviĝas tiaj makuletoj ankaŭ sur la jam kontrolitaj produktaĵoj? Ili tiel pensis kaj decidis denove fari kontrolon al la plejparte jam enkestigitaj produktaĵoj malgraŭ

ke tio estis temporaba. Ankaŭ la laboristoj esprimis ke ili volonte tion faros por garantii la kvaliton. Sub la gvido de la gvidanto ili elpakis 3,500 rulaĵojn da florde-segna katuno. Ili trankviliĝis post la rekontrolo, kvankam ili trovis makuletojn nur sur malpli ol duona rulaĵo da katuno.

Ili donas grandan atenton al la ĉiufanka kvalito. Dum la tuta produkta procedo, de la enporto de blanka katuno ĝis la prestinkturado, ili faras dekojn da kontroloj pri la ŝtofa forteco, firmeco de la surtoligitaj koloroj k.a.

Dank' al starigo de la penso servi al la popolo tutkore kaj tutanime, la gvidantoj kaj vastaj amasoj de laboristoj kaj teknikistoj de la fabriko ĉiam strebadis al pli alta nivelo de sia laboro. La fabriko sinsekve superplenumis la ŝtatan planon en 16 jaroj ekde 1958, senĉese multigis la specojn de florde-segna katuno, senĉese altigis la kvaliton kaj tiel ricevis konfidon de la konsumantoj.

Inter Ni



Kiel mi pasigas miajn lastajn jarojn

de VEJ GUJHIAN

“**K**IEL pasigas siajn lastajn jarojn la maljunaj komunumanoj perdintaj laborkapablon kaj parencojn en la popolaj komunumoj en la kamparo de Ĉinio?” Kiam mi informiĝis pri tio ke multaj legantoj de la gazeto *El Popola Ĉinio* zorgas pri la vivo de ni maljunuloj, mi tre kortuŝiĝis kaj volas iom paroli al ili pri la vivo de miaj lastaj jaroj.

Ĉijare mi havas la aĝon de 94 jaroj, loĝas en Bejtong-komunumo de Pubej-gubernio de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono kaj spertis tute malsaman vivon de la nova kaj malnova socioj. Mi naskiĝis en King-dinastio (1644 — 1911 p.K.), la lasta feŭda dinastio de Ĉinio. Mia familio havis neniam da kampo. Mia patro laboris kiel portisto por aliaj kaj mia patrino kolektis brullignon kaj vendis ĝin por vivteni la tutan familion. Je kvin monatoj antaŭ mia naskiĝo mia patro mortis survoje dum transportado pro penlaborado kaj malsano. Tial ni vivis en mizerego. Mi havis ses pliaĝajn fratinojn, el kiuj tri mortis pro malsano

kaj malsato, kaj la aliaj tri devis esti venditaj kaj fariĝis aŭ servistino aŭ infanfianĉino. Apenaŭ mi atingis la aĝon de ok jaroj, mia patrino forlasis nian mondon pro manko de mono por kuracigi sian malsanon. Ekde tiam mi fariĝis orfo kaj ĉien migris por almozi.

Poste mi laboris kiel jardungito de bienulo. Kvankam mi laboris por li tage kaj nokte, tamen mi neniam havis plenan stomakon, varman veston, lokon por dormi kaj eĉ ofte estis batita kaj insultita. Mi ne povis edziĝi pro malriĉeco kaj vivis sola en mia tuta vivo. Kiam mi estis jam ĉirkaŭ 70-jara, la bienulo ankoraŭ devigis min vektoporli lignon kaj stiri flosan por li. Tutjare mi laboris en montaro aŭ flosis sur akvo. Mi baraktadis en mizero kaj ĉiaj suferoj, kaj mia vivo estis pli amara ol tizano de koptido kaj porka galo.

Mi atendadis tage kaj nokte, kaj en oktobro de 1949 venis al nia vilaĝo la savanto — la Komunista Partio kaj ĝin liberigis. Ni malriĉuloj fariĝis


mastroj de la ŝtato. La popola registaro starigis la sistemon de kvin garantioj de manĝo, vestoj, loĝejo, kuraco kaj enterigo post morto al la laborantaj popolanoj perdintaj laborkapablon kaj parencojn. Mi ricevis du ĉambrojn kaj meblojn. Mia manĝo kaj vestoj estis garantiataj. Post la fondiĝo de la popola komunumo, la produktbrigado prenis min kiel “membron de kvin garantioj” por ke mi povu feliĉe pasigi miajn lastajn jarojn. Ĉiujare la produktbrigado provizis al mi pli ol 280 kilogramojn da greno, produktaĵojn de flankokupoj, aliajn grenojn kaj manĝoleon. Mi ĉiam ricevis porcion, same kiel la aliaj komunumanoj. Krome ĉiumonate mi ricevis poŝmonon. Se mi en la produktbrigado faris plektadon laŭ mia ebleco, la produktbrigado ankoraŭ donis al mi rekompencan. Miaj vestoj, moskitovualo kaj litkovrilo ĉiuj estis donitaj de la popola komunumo. Ĉiujare mi ricevas novajn vestojn necesajn por ĉiuj sezonoj. Okaze de festoj la brigado donas al mi porkaĵon, freŝajn fiŝojn, sukeron kaj gluecan rizon por ke ankaŭ mi ĝoje celebri la festojn kiel la aliaj komunumanoj. La komunumanoj varme traktas min kiel samfamilianon kaj ofte invitas min gastigi en ilia hejmo. Mi havas pecon da legomkampoj kaj ili plugis kaj akvumis ĝin por mi. La brulligno kaj akvo, kiujn mi bezonas, estas alportitaj al mi de komunumanoj laŭ aranĝo de la produktbrigado. Kiel la aliaj komunumanoj mi vivas feliĉe kaj neniom sentas solecon.

En la malnova socio, mi devis longe fari pezegan laboron tutjare. Neniu zorgis pri miaj malsato,

malvarmo kaj malsano. Nun, kiam mi estis iom malsana, kadroj kaj komunumanoj de la produktbrigado tuj vizitis min. La kuracistoj de la hospitalo de la komunumo kaj la kuracejo de la brigado venis al mia domo por senpage doni medicinan helpon al mi

En aprilo de la antaŭlasta jaro, mi trafis akutan apendiciton kaj mia vivo estis en danĝero. Informiĝinte pri tio, kadroj kaj komunumanoj tuj venigis al mi ambulancan kaj sendis min al la popola hospitalo de nia gubernio en la sama nokto por operacio. Dum la kuracado, mi estis flegata de du komunumanoj senditaj de mia brigado. Ili helpis min preni manĝaĵon kaj medikamentojn, lavis vestojn por mi kaj min traktis pli bone ol parenco. Post kuracado de 15 tagoj en la hospitalo mi tute resaniĝis. Por mia malsano la brigado pagis la kostojn por veturado, medikamentoj kaj manĝaĵoj, kaj la komunumo ankoraŭ donis al mi subvencian por nutraĵo. Mi ne estus plu en tiu ĉi mondo, se tio okazus en la malnova socio. Pro la garantio de vivbezonaĵoj kaj kuracado nun mi fartas tre bone.

En nia komunumo ĉiuj laboruloj kiel mi feliĉe pasigas siajn lastajn jarojn sub la prizorgado de la Partio kaj la popolo. Ĉiufoje kiam mi rememoras la pasintecon kaj ĝin komparas kun la hodiaŭa feliĉo, mi sentas fortan emocion kaj volas elverŝi mian koran senton.




ELDONO DE LIBROJ PRI KRITIKO AL LIN BIAŬ KAJ KONFUCIO

Por pli profunda kritikado al Lin Biaŭ kaj Konfucio fare de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj kadroj, la Popola Eldonejo eldonis kvar librojn nome *Eldiroj de Lusin pri Kritiko al Doktrinoj de Konfucio kaj Mencio*, *Kolektitaj Artikoloj pri Kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio (I)* kaj (II) kaj *Citaĵoj de Reakciuloj kaj Bienulaj kaj Burgaj Intelek-*

tuloj post la Movado de la 4-a de Majo pri Kulto de Konfucio kaj Restarigo de Antikveco.

Kolektitaj Artikoloj pri Kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio (I) inkluzivas artikolojn “Konfucio — Pensulo, Kiu Obstine Defendis Sklavsystemon”, “Batalo de Materiismo kontraŭ Ideismo kaj Apriorismo en la Orienta kaj Okcidenta Handinastioj” verkitaj de Jang Ĵongguo kaj “Ĉu Konfucio Estas Tutpopola Edukisto?” verkita de Tang Hiaŭven kaj aliajn kvin artikolojn. *Kolektitaj Artikoloj pri Kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio (II)* entenas en si artikolon de Jang Ĵongguo “Konfucio — Saĝulo de la Reakciaj Klasoj”.



Raporto pri

riĉa rikolto al amikoj


de HINGGI

EN la tagoj de riĉa rikolto la komunumanoj de Ŝaŝiju-brigado de Zunhua-gubernio, Hebej-provinco banis en ĝojo. Ili varme celebris la novajn venkojn de la revolucio kaj produktado akiritajn de ili sub la puŝado de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj reĝustigo de laborstilo, kaj raportis tion al la amikoj el kvin kontinentoj, kiuj vizitis Ŝaŝiju.

DANKON AL LA AMIKOJ PRO ILIA KURAGIGO KAJ ZORGO

En la lastaj jaroj pli ol 3,000 amikoj el 97 landoj kaj regionoj de kvin kontinentoj veturis trans maroj al nia lando kaj vizitis Ŝaŝiju-brigadon. Tie ili vidis heroajn figurojn de la nuntempaj Malsaĝaj Avoj en pena transformado de Ĉinio kaj la revolu-

La membroj de la partia filio de Ŝaŝiju-brigado kaj amasoj kune faras projekton pri montregiona konstruado.



cian spiriton de la liberigita ĉina popolo, kiu kreis belan pentraĵon sur blanka papero, sin apogante sur propraj fortoj kaj pene luktante en malfaciloj.

Antaŭ la Liberiĝo Ŝaŝiju estis malriĉa montvalo, kie tero kaj akvo estis karaj, ĉie kuŝis grandaj ŝtonoj kaj la popolanoj vivis tiel mizere, ke ili plenis sian stomakon per sovaĝaj herboj kaj brano kaj ne havis vatitan veston por sin varmigi eĉ en la plej frostaj vintraj tagoj. Post la Liberiĝo la vasta amaso de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj persistis sur la socialisma vojo, kreis kampojn sur ŝtonoj kaj plantis arbedojn en ŝtonfendoj per la spirito de la Malsaĝa Avo. La penema luktado de pli ol 20 jaroj portis al Ŝaŝiju gigantajn ŝanĝiĝojn. En 1973 la totala produkto-kvanto de greno de la brigado atingis pli ol 300 tunojn, t.e. 9-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo, kaj krome estis rikoltitaj ankaŭ pli ol 130 tunoj da diversaj fruktoj.

Akirinte riĉan rikolton la Ŝaŝiju-anoj sopiras al la vizitintaj kamaradoj kaj amikoj de diversaj landoj kaj kore dankas al ili pro ilia kuraĝigo kaj zorgo.

En 1966, kiam la prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de Albanio kamarado Mehmet Shehu kaj aliaj vizitis Ŝaŝiju akompanate de ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, li intime kuraĝigis: “La popolanoj de Ŝaŝiju estas bravuloj pli firmaj ol la ŝtonoj sur montoj. Tie ĉi ni vidis, ke la granda penso de Maŭ Zedong

jam transformiĝis en materian forton por socialisma konstruado. Kiel kamaradoj, ni elkore amas vin.”

En septembro de 1971 pli-ol-70-jara usona amiko Max Granich kaj lia edzino vizitis Ŝaŝiju. Tiu sin okupis pri la gazeto *Voĉo de Ĉinio* en Ŝanhajo antaŭ pli ol 30 jaroj, simpatiis kaj subtenis siatempe la ĉinan revolucion kaj ŝirmis iam niajn revoluciajn kamaradojn. Vidinte la heroaĵojn de la tieaj popolanoj en transformado de naturo, li ĝoje diris, ke la spirito de la Ŝaŝiju-aj popolanoj estas kuraĝigo por la popoloj batalantaj por konstrui novan mondon.

En oktobro de 1971, iu ĵurnalisto de itala nacieco vizitis Ŝaŝiju. Kiam la komunumanoj donacis al li kelkajn ŝtonojn elfositajn dum ilia konstruado de kampoj, li ĝoje diris: “Mi ŝatas la ŝtonojn donacitajn de la ĉina popolo. Ili estas pli karaj ol tiuj sur la luno!”

Reveninte al sia patrolando post vizito al Ŝaŝiju, la Delegacio de la Koreaj Ĵurnalistoj entuziasme prezentis, ke Ŝaŝiju estas viveca kaj konkreta ekzemplo, en kiu oni povas vidi kiel la ĉina popolo brave antaŭenmarŝas.

La komunumanoj de Ŝaŝiju ricevis librojn, gazetojn, metiartaĵojn kaj entuziasmajn leterojn de la amikoj de Vjetnamio, Laoso, Albanio, Japanio kaj batalanta Afriko. Ili metis tiujn donacaĵojn en la ekspozicion kun la celo eduki sin kaj siajn poste-



Riĉa rikolto de pomoj de Ŝaŝiju-brigado

ulojn por ke ili vivantaj en Ŝaŝiju zorgu la tutan mondon. En la tagoj de riĉa rikolto ili rememoras la pasintecon kaj esprimas sian amikecon al la malproksimaj diverslandaj amikoj.

KALVAJ MONTOJ PORTAS SUR SI NOVAN VESTON

Multaj el la fremdlandaj amikoj vizitantaj Ŝaŝiju verve fotis la tiean prosperan vidaĵon de ŝtuparaj kampoj, kanaloj kaj nove plantitaj arboj. Ili elmetis saman demandon: Kiel oni transformis tiun malriĉan montvilaĝon kie akvo mankis kaj tero malabundis?

La sekretario de la partia filio de la brigado Ĝang Gujŝun kaj la komunumanoj respondis, ke la ŝanĝigo de Ŝaŝiju rezultis el la longtempa kaj malfacila laboro fare de ili per ŝultroj kaj manoj sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Ili prezentis ekzemplon el forstumado. En la jaro 1954 la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ŝaŝiju decidis transformi tiujn kalvajn montojn en fruktoĝardenojn. Tiam klasaj malamikoj atakis dirante: “Se oni volas ke frukto- arboj sur ŝtonaj montoj kresku kaj donu fruktojn, tio sukcesus nur kiam virkoko demetus ovon!” Gvidate de la partia filio la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj fosis 5,700 kavojn sur malmolaj ŝtonoj per feraj marteloj, ŝtalaj stangoj kaj pioĉoj en tempo de 90 tagoj kaj noktoj. Poste ili elfosis korbon kaj korbon da tero el ŝtonfendoj kaj metis ĝin en la kavojn por planti pomarbojn. La plantitaj pomarbidoj burĝonis, floris kaj donis fruktojn post kelkaj jaroj. Kiu diras ke “virkoko” de Ŝaŝiju ne povas demeti ovon! La fakto peze batis la klasajn malamikojn kaj ankaŭ edukis homojn kun konservativa penso. De tiam la komunumanoj ĉiujare plantis arbidojn ĉie. Ĝis nun la tuta brigado forstumis pli ol 60 hektarojn, inter kiuj triono estas plena de arbaro. Krome ili plantis pli ol 60,000 fruktarbojn. Vidinte la disvolviĝon de Ŝaŝiju iu transmara ĉino verkis poemon:

*Maŭzedongpens' lumigas la montvalojn,
La mastroj ja fariĝis ni l' popoloj.
Nur se ni la Partion ĉiam sekvas,
Sur ŝtonoj kreskos certe buntaj floroj.*

La komunumanoj de Ŝaŝiju rakontis al la vizitantaj fremdlandaj amikoj ankaŭ aferon pri ilia transportado de tero por krei kampojn. Antaŭe tie troviĝis en ŝtonfendoj kaj sur deklivoj nur malmulte da malgrandaj terpecoj kultureblaj. Kion fari? Ili decidis do mem krei kampojn. En 1957



Intelektaj junulinoj fiksloĝantaj en Ŝaŝiju lernas de Ĝang Gujŝun, sekretario de la partia filio de la brigado flegadon de plantaĵoj.

la partia filio de Ŝaŝiju alvokis ĉiujn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn ke ili transformu ĉiujn deklivajn kampojn en ŝtuparajn por radikale ŝanĝi la fizionomion de la loko.

Tiam iu dubis pri tio nee skuante la kapon. Li diris: “Mia familio vivas plurajn generaciojn en Ŝaŝiju, la du montetoj antaŭ mia domo restas neniom ŝanĝitaj. Kiu kapablas ilin translokigi?” Sub la gvido de la Partio la kadroj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj serioze studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* kaj lian instrukcion pri avangardaj aferoj de Ligiaĝaj de Ŝandong-provinco en transformado de montoj en kampojn: “**Ligiaĝaj estas bona ekzemplo en transformado de Ĉinio per spirito de la Malsaĝa Avo, kiu translokiĝis montojn.**” La instruoj de Prezidanto Maŭ kuraĝigis ilian batalvolon kaj ili diris: “Ni kaj Ligiaĝaj estas sub la sama suno. Kion ili povis fari, tion ankaŭ ni povas.” Ekbolis Ŝaŝiju. Gvidate de la partia filio de la brigado la junuloj formovis la du montetojn antaŭ domo de tiu, kiu dubis pri la afero,



Ŝnurtirado de la lernantoj de Ŝaŝiju-a Elementa Lernejo sub direktado de la instruisto post la kurso

post diligenta kaj malfacila laboro de tri monatoj kaj kreis kampon plej grandan tiam en la tuta vilaĝo. De tiam la komunumanoj de Ŝaŝiju ĉiujare persistis en transformado de montoj en kampojn kaj ĝis 1963 la areo de ilia agro trione pligrandiĝis.

En 1964 Prezidanto Maŭ elmetis grandan alvokon **“Ierni de Daĝaj en agrikulturo”**. Lerninte lian instruon kaj rememorinte sian historion de montotranslokigo en ia pasintaj dekelkaj jaroj la komunumanoj firme kredis, ke kun unuanimeco ĉion oni povas fari. Kamarado Ĝang Gujŝun kun la amaso sub sia gvido komencis novan provon — konstrui kampojn sur ŝtonoj. En la lastaj jaroj, disvolvante la spiriton de penema luktado kontraŭ malfaciloj Ŝaŝiju-anoj konstruis 40 hektarojn da Daĝaj-tipaj kampoj.

Pro manko de akvo Ŝaŝiju-anoj spertis multajn suferojn. Post la Liberiĝo ili per kolektivaj fortoj faris batalon kontraŭ sekegeco kaj akiris venkojn unu post alia.

En la pasintaj multaj jaroj tieaj popolanoj malsukcesis en multfoja fosado de putoj. Tamen ili ne ŝanceliĝis nek deprimiĝis pro tio. En vintro de 1965, sub la gvido de la partia filio de la brigado fondiĝis speciala akvoutiliga grupo kun pli ol 20 homoj. Post malfacila laboro de vintro ĝis printempo ili sukcese fosis unu puton. Je la 20-a de majo de 1966 klara akvo fluis en soifajn kampojn

tra tubo longa je pli ol 1,000 metroj transpasante du monteĝojn. Tiutage la viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj de Ŝaŝiju ĝoje kuris al la putoj. Vidinte la klaran akvon ili senĉese kriis kun emociaj larmoj: “Vivu Prezidanto Maŭ!”

Kun plimultiĝo de la fositaj putoj kaj kreitaj ŝtuparaj kampoj giganta ŝanĝiĝo okazis al Ŝaŝiju. Sed la komunumanoj ne haltis post la sukceso. En du monatoj de printempo de 1973 ili ebenigis 5 malgrandajn montpintojn, formovis 20,000 kubmetrojn da teraĵo kaj ŝtonoj, konstruis akvedukton kun longeco de 272 metroj, kiu servas por lasi torenton, kaj formis sur la akvedukto 2 hektarojn da Daĝaj-tipaj kampoj. Nun la komunumanoj konstruas ankoraŭ pli grandajn kanalojn ĉirkaŭantajn orientan kaj nordan montojn de Ŝaŝiju.

SANE KRESKAS ARBOJ DE AMIKECO

La penema luktado de Ŝaŝiju profunde kortuŝis multajn fremdlandajn amikojn. Iuj el ili proponis ke ili transportu ŝtonojn kaj teraĵon kune kun la komunumanoj por verŝi sian ŝviton sur la teron de Ŝaŝiju kiel memoraĵon.

En la 10-a de januaro de 1972 super la montvalo de Ŝaŝiju sonis kantado de *Pekino* — *Tiraneo*. Tie 44 vizitantoj kunbatalantoj de la Albana Popola Armeo estis laborantoj kune kun komunumanoj por konstrui Daĝaj-tipan kampon. Ili vektportis


terajon flugrapide. Ankaŭ kelkaj pliaĝaj komandantoj de la Albana Popola Armeo partoprenis en la laboro. Ili diris: “Veninte al Ŝaŝiju ni forgesis lacon. Laborante kune kun vi ni estas kuraĝigataj de la spirito de la Malsaĝa Avo.” Post laboro de pli ol 3 horoj formiĝis malgranda peco da “Kampo de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio”. Ĉe la kampo oni starigis ŝtonplaton, sur kiu estas skribita en la ĉina kaj albana lingvoj: “Nerompebla kaj eterna estas la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio!” En 1973 komunumanoj kulturis tritikon kaj hibridan sorgon sur tiu kampo kun areo de ĉirkaŭ 0.03 hektaro kaj sume rikoltis 250 kilogramojn da greno. Ili ĝoje diris: “Ni kreis altan produkton en la amikeca kampo.”

En ŝtuparaj kampoj de Ŝaŝiju kreskas bonaj specioj de multaj landoj, inter kiuj estas sezamo el Vjetnamio, tritiko el Eŭropo kaj brasiko, kapsiko, ŝenoprazo kaj blanka fabo el Ameriko. En la lastaj jaroj Ŝaŝiju-anoj ricevis sume 19 speciojn de semoj de agrikulturaj plantoj donacitajn de fremdlandaj amikoj. La partia filio komisiis la taskon

kulturi tiujn semojn al la scienca eksperimenta grupo de la brigado kun jena diro: “Tiuj semoj reprezentas profundan amikecon de diverslandaj amikoj kaj vi nepre klopotu por ke ili radikigu, floru kaj donu fruktojn en Ŝaŝiju.”

Ambaŭflanke de la ŝtone pavimita vojo de la brigada oficejo ĝis la norda monto kreskas du vicoj da pinoj kaj cipresoj kun prosperaj branĉoj kaj foliaroj en rokfendoj. Tiuj estas “amikecaj arboj” plantitaj de vizitantaj diverslandaj amikoj. En novembro de 1971 la delegacio de la Kanadaj-Ĉinaj Amikecaj Asocioj de Vancouver kaj Victoria venis al Ŝaŝiju. Kiam ili vidis sane kreskantajn cipresojn plantitajn de la Kanada-Ĉina Amikeca Delegacio de Vancouver dum ĝia vizitado en 1966, ili tre ĝojis. Por esprimi sian amikecon ili plantis tie “Arbon de Amikeco inter Kanada kaj Ĉina Popoloj”. Ili diris: “Nia ŝvito fandiĝis kun la spirito de penemalukto de la komunumanoj de Ŝaŝiju. Tiu arbo simbolas la eternan amikecon inter la kanada kaj ĉina popoloj!”

Milio de Ŝaŝiju-brigado



Postdorse de la Tiel Nomata

“Energia Krizo”

NUN la ĉefaj kapitalismaj landoj frontas seriozan “energian krizon”. La manko de petrolo influis la produktadon kaj vivon de tiuj landoj. Oni maltrankvile babiladis pri la malfacila stato. Burĝaj ĵurnaloj de iuj landoj asertis, ke tian staton kaŭzis naturaj riĉfontoj, t.e. “elĉerpiĝo de la energia fonto”, kaj iuj eĉ atribuis la kaŭzon al la arabaj popoloj, ke ili uzis petrolon kiel armilon. Per tiuj diroj, kiuj kaŝis la veran kialon aŭ transigis fatalon al aliuloj, oni celas konduki la publikon en labirinton kaj miksi veron kun falso.

Sed kio tio estas efektive?

La nuna “energia krizo” ĉefe manifestiĝis per nesufiĉa provizo de petrolo. La fenomeno montris, ke tio ŝajne estas problemo de naturaj riĉaĵoj, sed la fakto tute estas alia. En la mondo, inkluzive de la ĉefaj kapitalismaj landoj, troviĝas abunda energia fonto, kiu sufiĉas por mil jaroj laŭ la plej konservativa takso. Kaj krome kun disvolviĝo de produktado kaj senĉesa altiĝo de konado de la homaro, oni trovas kaj trovos novajn energiajn fontojn. La “energia krizo” de la kapitalisma mondo esence estas speguliĝo de la krizo de la kapitalisma sistemo, konsekvenco de akriĝo de diversaj kontraŭdiroj interne de kapital-imperiismo kaj rezulto de kruela ekspluato kaj freneza prirabo de la monopola kapitalo al la popoloj en kaj ekster la lando. En la nuna tempo, tia stato ankaŭ estas rekta sekvo de freneza ekspansio kaj konkurado por la monda hegemonio fare de la du superpotencoj la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo.

Sub la kapitalisma sistemo, **“produktado de plusvaloro aŭ profito estas la absoluta leĝo de la maniero de produktado”** (Marks, *Kapitalo*). Ĉasi altegan monopolan profiton estas la naturo de la monopola burĝaro. En ekspluatado de energio, kapitalistoj neniam konsideras pri racia utiligado de energio, sed ĉiam pri ĉasado de pli multa profito. La produktado de diversaj specoj de energio ofte dependas de grandeco de profito. Antaŭe karbo estis la ĉefa fonto de energio, “greno de industrio”.

Nun la mondo ankoraŭ havas abundan konservon de karbo. Sed la karba industrio ĝenerale dekadenciĝis en la ĉefaj kapitalismaj landoj. Eĉ en Usono kiu havas plej abundan konservon de karbo en la mondo, la produktita karbo okupis nur kvinonon de energia produkto. Ĉar el la vidpunkto de profito, kosto de karboekspluatado estas pli kara ol tiu de petrolekspluatado, tial ĝi ne estas apertveka por kapitalistoj. Ankaŭ el oleskisto kaj oleoza sablo oni povas ekstrakti petrolon. Nun la mondo jam sciis, ke la kvanto de petrolo entenata en oleskisto kaj oleoza sablo estas multoble pli granda ol tiu de subtera nafto. Sed la kosto de ekstrakto per oleskisto kaj oleoza sablo estas pli kara ol tiu de ekspluato de nafto, kio estas tre domaĝa por kapitalistoj, tial ili tute ne donis atenton al tio kaj la afero restis senprogresita.

Kapitalismo signifas malŝparon. En la kapitalisma mondo, anarkiismo en produktado kaj luksemo en la vivo forkonsumis grandan kvanton da petrolo. Laŭ takso, en Usono la nete akirita petrolo nur okupis 35 procentojn de la ekspluatebla petrolkonservo, t.e. por akiri unu tunon da petrolo oni devas forlasi du tunojn. La malŝparo en uzado de energio estas pli mirinda. Nun en la ĉefaj kapitalismaj landoj la neporprodukta elektra konsumo okupis trionon aŭ duonon de la totala elektro. Usona ĵurnalo konfesis, ke duono de la usona energio estis malŝparita. La freneza armeekspansio kaj agresiva milito fare de la imperiismo kaj social-imperiismo estas la “senfunda barelo” de petrolo. Jen estas la radika kaŭzo, ke okazis “energia krizo” en iuj kapitalismaj landoj kiuj pretendadis sin evoluintaj, kvankam la mondo havas senprecedence abundan fonton de energio de diversaj formoj.

Imperiismo signifas agreson kaj rabadon. Pro tio ke petrolo havas gravan lokon en ekonomio kaj strategio, kaj ke ekspluato de alilanda petrolo donos profiton pli grandan ol tiu de sia lando, monopolaĵ kapitalistoj forlasis la enlandan petrolon kaj svarmis al la tria mondo por okupi teron kaj prirabi la pe-

trolon. Ili aparte avidas Mezorionton, kiu havas abundan petrolan fonton kaj okupas gravan strategian pozicion en politiko kaj geografio. Tial Mezoriento fariĝis sorĉa arbo de alilanda monopola kapitalo por akiri profitegon kaj fariĝis fokuso de la longtempa konkurado de imperiismaj landoj. Post la Dua Mondmilito, Usono anstataŭis Brition kaj fariĝis la plej feroca prirabanto de mezorienta petrolo. Nun pli ol duono de la petrola produktado de Mezoriento estas regata de la usona monopola kapitalo. En la fino de 1972 la rekta privata investo de Usono al mezorientaj petrolaj entreprenoj atingis sume 1.8 miliardojn da dolaroj, kaj en la sama jaro la profito atingis 2.4 miliardojn da dolaroj, kio estas 130% de la investo, kaj estas dekoble pli granda ol meznombra profito de la eksterlanda investo. La falsa prospera aspekto de la imperiismo post la Dua Mondmilito baziĝas sur prirabo de natura riĉaĵo kaj sur la pezega laboro de la popoloj de la tria mondo.

Imperiisma leĝo disponas ankaŭ la social-imperiismon. Kun granda ambicio ĝi partoprenas en dividado de la mondo fare de imperiismaj landoj. Kvankam ĝi ne havas sufiĉan forton por ekspluati ian petrolan fonton de sia lando kaj iris al okcidentaj landoj por allogi kaj almozpeti de ili investojn, tamen ĝi antaŭlonge avidis la petrolan fonton de Mezoriento kaj kun la tuta forto penetradis tien por konkuri kun Usono pri la petrola hegemonio en Mezoriento. Por tio ĝi prenis diversajn rimedojn, jen “militan helpon”, jen “ekonomian helpon”, metante grandan vetajon. Ĝi energie faras rabis-tajn negocojn per “municio kontraŭ petrolo”, “maŝino kontraŭ petrolo” kaj el tio multe profitis. Ekzemple, en revendo de natura gaso aĉetita de iu lando ĝi akiris 300% da profitego. En prirabo de petrolo de Mezoriento ĝiaj rimedoj estas multe pli ruzaj ol tiuj de la okcidentaj imperiismaj landoj.

Pro tiuj kaŭzoj, en longa tempo la vera viktimo de petrola problemo estas arabaj landoj kaj aliaj petrolproduktaj landoj de la tria mondo. Mez-grandaj kaj malgrandaj landoj, kiuj posedas kaj liveras grandan kvanton da petrolo, estas malevoluintaj malriĉaj landoj, sed la landoj-konsumantoj de ilia petrolo fariĝis evoluintaj riĉaj landoj. Ĝuste tiu maljusta stato pelis la petrolproduktajn landojn de la tria mondo al la batalo por protekti la ŝtatan suverenecon kaj riĉfonton de sia nacio. Ĉifoje la arabaj landoj unuanime prenis petrolon kiel armilon por batali kontraŭ cionismo kaj ĝiaj subtenantoj per redukto de petrolprodukto kaj altigo de petrola prezo. Tio estas rekta rezulto de komplotoj kaj

konkurado de la du superpotencoj en Mezoriento. Esenco de la mezorienta problemo estas petrola problemo kiu strikte ligiĝas kun konkurado por la monda hegemonio. Ĝuste pro tio la du superpotencoj tute ignoris la interesojn de la arabaj popoloj, longtempe tenis Mezorionton en stato “nek milita, nek paca”, subtenis kaj instigis Izraelon al agreso. Tio devigis la arabajn landojn leviĝi al rezisto. La petrola batalo de la arabaj landoj ja estas batalo kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo. La du superpotencoj ne plu povis tute kontroli la mezorientan situacion kaj laŭplaĉe prirabi aliajn landojn. La petrola krizo estas esence hegemonia krizo de la du superpotencoj.

La uzado de petrola armilo fare de la arabaj landoj skuis la kapitalisman mondon. Tio pli klare respondis la demandon: Kiu vivtenas kiun nun en la mondo? Antaŭe imperiistoj ĉiam propagandis, ke ili vivtenis la popolojn de la disvolviĝantaj landoj, kaj ke sen ilia “helpo” la popoloj de tiuj landoj eĉ unu tagon ne povus vivi plu. Nun la petrola batalo refoje montris al la mondo, ke sen sklavigo kaj ekspluato al la disvolviĝantaj landoj la imperiismo kaj social-imperiismo mem ne povos vivi unu tagon plu. Ili estas parazitaj sur la popoloj de la disvolviĝantaj landoj. Ilia riĉeco estas bazita sur prirabo, dum la malriĉeco de la tria mondo estas kaŭzita de ilia ekspluato kaj prirabo. La petrola batalo liberigis la homojn en la penso, akcelis ilian konsciigon kaj plifortigis la unuiĝon de la popoloj, kio naskos profundan influon al la batalo de la monda popolo.


“Energia krizo” estas unu el la manifestiĝoj de la malordo de la nuna mondo. Ĝi puŝos la mondon en daŭran malordon. Nun akriĝis diversaj kontraŭdiroj de imperiismo, precipe tiu inter la du superpotencoj kaj la popoloj de la mondo kaj tiu inter la du superpotencoj mem. La plenforta propagando pri “energia krizo” fare de proparolantoj de la usona monopola kapitalo celas transigi la “krizon” al la enlanda popolo por daŭre akiri profitegon, fari premon al la tria mondo, intensigi la konkuradon kun la alia superpotenco por protekti iliajn interesojn en Mezoriento. En konkurado kun Usono por la hegemonio en Mezoriento, la social-imperiismo, perfidante la arabajn popolojn sub la masko de “helpo”, fervore distrumpetis ke la mezorienta petrolo estas “internacia riĉaĵo”. Ĝi kriaciis: “Forme la araba petrolo estas araba riĉaĵo, sed fakte ĝi estas internacia riĉaĵo.” Evidente, la absurdaĵo rekte atencas la arabajn popolojn kaj propagandis la imperiisman tezon, ke “rabo

estas justa". Samtempe ĝia tezo rekte direktiĝas al la petrola hegemonio de la alia superpotenco: Vi ne povus sole monopoli la petrolon, sed ni ambaŭ kune profitu. Tia imperiisma teorio malkaŝis ĝian veran vizaĝon de feroĉa malamiko por la arabaj popoloj kaj montris ĝian arogantan ambicion ekspansii al Mezoriento kaj regiono de Persa Golfo. Tamen la epoko ŝanĝiĝis kaj la arabaj popoloj ne plu estas ŝafidoj laŭplaĉe buĉeblaj. Ili jam prenis petrolon-armilon kaj aliajn armilojn kaj batalas por protekti sendependecon, suverenecon de siaj landoj kaj vivrajton.

La diraĵo de la Okcidento ke baldaŭ elĉerpiĝos la energia fonto de la mondo, estas tute pesimisma aserto de la dekadencaj klasoj pri energia problemo. De kiam la homaro enpaŝis en klasan socion, la ekspluato kaj utiligo de energio estas interligitaj kun produkta metodo de certa socio. Progresema socia sistemo akcelas la disvolviĝon de la sociaj produktaj fortoj, dum putra kaj dekadencan socia sistemo malhelpas la disvolviĝon de la sociaj produktaj fortoj. Prenu ekzemple nian landon. Ĉinio havas vastan teritorion kaj abundan riĉfonton inkluzive energion de diversaj formoj. Sed en la duonkolonia kaj duonfeŭda Ĉinio, imperiistoj ne nur forrabis grandan kvanton da nia valora energio, sed ankaŭ asertis ke nia lando estas "malriĉa je petrolo". Post la Liberiĝo tute ŝanĝiĝis la ĉina situacio. **"La socialisma sistemo akcelis flugan**

disvolviĝon de produktaj fortoj de nia lando". Natura energia fonto estas senĉese trovita kaj ekspluatata. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, observante la principon de sendependo kaj sinapogo sur propraj fortoj, la ĉina popolo rapide forĵetis la ĉapelon de la lando "malriĉa je petrolo". Por ĉiam forpasis la tagoj en kiuj oni tute dependis de "fremdlanda petrolo". Nun nia lando havas sufiĉan petrolon ne nur por sia propra bezono, sed ankaŭ por eksporto. La ĉina popolo nun skribas tute novan paĝon en la historio de ekspluato kaj utiligado de energio.

"Energia krizo" estas krizo de la kapitalisma sistemo. La mondo neniam frontos "energian elĉerpiĝon", sed nur kapitalismo, **"tiu kontraŭrevolucia sistemo elĉerpis sin mem, elĉerpis siajn sociajn fortojn"**. (Lenin, *Nuntempa Rusio kaj Laborista Movado*) Tio servas kiel klara marko de daŭra dekadenciĝo de imperiismo. Kian ajn staton frontos estonte la livero kaj postulo de energio de la kapitalisma mondo, la ĝenerala tendenco de disvolviĝo de la historio estas senduba kaj neŝanĝebla. Proletaro kaj la revoluciaj popoloj finfine entombigos la damnindan ekspluatatan sistemon kaŭzantan diversajn krizojn kaj efektiviĝos la grandan idealon — komunismon. La homaro certe marŝos pli rapide sur la larĝa vojo de reformo de la socio kaj naturo, liberigos sin el la naturo kaj kreos miraklojn malfacile imageblajn por hodiaŭ.



NOVA DISVOLVIĜO DE METEOLOGIA AFERO EN ĈINIO

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio nia meteologia afero havis relative grandan disvolviĝon. Plue fortiĝis kaj vastiĝis meteoproгноza reto de la tuta lando formita el la centra observatorio de Pekino, observatorioj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, meteostacioj de gubernioj kaj meteologiaj observejoj kaj veterobservaj grupoj en la kamparo. Laŭ statistiko en 1973, krom plimultiĝo de la ŝtataj observatorioj kaj meteostacioj, ankaŭ la nombro de meteolo-

giaj observejoj kaj veterobservaj grupoj de la popolaj komunumoj en la kamparo pli rapide kreskis. Nur la meteologiaj observejoj jam nombriĝis ĉirkaŭ 10,000. Iuj observatorioj kaj meteostacioj sin armis per modernaj teknikaj ekipaĵoj. Fundamente formiĝis meteologia radara reto de Guangdong ĝis Ŝandong kaj tajfuno-informa linio ĉe la bordo de la orienta kaj suda maroj de Ĉinio. En iuj observatorioj oni uzas elektronikajn komputilojn produktitajn de nia lando en meteoinformado kaj kombinis novan sciencon teknikon kun spertoj de la amasoj. Ĝustatempa veterinformado, liverado de diversaj meteologiaj informoj kaj materialoj ludas gravan rolon en la nacia ekonomio kaj konstruado, sekura navigado kaj popola vivo.

Kolektado de tritikaj spikoj



4



5



La manĉuroj

de ZONG MIN

LA pli ol 2,430,000 membroj de la manĉur-nacieco vivas en diversaj lokoj de la lando, 40% inter kiuj loĝas en Liaŭning-provinco kaj la ceteraj en Gilin, Hejlonggiang, Hebej, la Interna Mongolio, Hingiang, Pekino, Kantono kaj aliaj lokoj.

La manĉur-nacieco formiĝis en la komenca periodo de la 17-a jarcento. Ĝiaj praavoj estis njuĝen-oj en Ming-dinastio, kiuj devenis de la suŝen-oj antaŭ 3,000 jaroj. Pro tio la manĉur-nacieco estas unu el niaj naciecoj kun longa historio. En la 4-a jarcento la posteuloj de Suŝen prenis al si la nomojn Vugi kaj Mohe, kaj en la 10-a jarcento Mohe alinomis sin Njuĝen. En la komenca periodo de la 15-a jarcento, Ming-dinastio starigis pli ol 300 administrajn organojn en Njuĝen-regiono kaj titolis la ĉefojn de la triboj de Njuĝen kiel gubernatorojn, komandantojn, milfamiliestrojn kaj centfamiliestrojn. En la meza periodo de la 16-a jarcento, ĉefo Nurhaĉi unuigis ĉiujn tribojn de Njuĝen, de tiam unuapaŝe formiĝis la manĉur-nacieco. Je la jaro 1616 Nurhaĉi starigis lokan reĝimon de sklavposedantoj nomatan Granda Ĝin. Je 1636 Huangtajgi, la filo de Nurhaĉi, nomis sin imperiestron, alinomis la Grandan Ĝin Granda King kaj donis al sia nacieco la nomon manĉuro.

En la komenca periodo la manĉuroj havis okulfrapajn karakterizaĵojn kun la komuna manĉura lingvo, lertaj rajdado kaj arkopafado. 6-7-jaraj infanoj sin ekzercis en arkopafado kaj la iom pli aĝaj kun arko kaj sagoj galopis sur ĉevalo tra montoj kaj arbaroj por ekzercado. Ankaŭ la knabinoj faris tion kutime. La manĉuraj viroj sin vestis per robo kaj jako kun hufo-formaj manikoj kaj ligis sin je la talio per rubando. La virinoj sin vestis per robo kaj broditaj ŝuoj.

Dum sia unuiga procedo la manĉur-nacieco starigis sistemon de unuecaj organizoj de armeo kaj registaro — ok *ki*-oj, per kiuj la regantoj de la manĉur-nacieco komandis militistojn kaj regis la popolanojn.

En la jaro 1644 la regantoj de la manĉur-nacieco komandis la soldatojn de la ok *ki*-oj suden tra Ŝanhajuan-pasejo en la centran Ĉinion kaj fondis King-dinastion. La soldatoj estis sendataj al la diversaj lokoj por garnizonado, el kio rezultis ke la manĉuroj loĝas en diversaj lokoj de la tuta lando.

Post la Opia Milito Ĉinio iom post iom fariĝis duon-feŭda kaj duon-kolonia socio, la manĉuraj kaj han-aj popolanoj same suferis de subpremado kaj ekspluatado fare de imperiismo kaj feŭdismo kaj faris en solidareco komunan batalon kontraŭ fremdlanda invado. Manĉuroj partoprenis en la Opia Milito, la Milito inter Ĉinio kaj Japanio, Jihetuanmovado kaj la Revolucio de 1911. La vasta manĉura popolo kaj la plenmano da manĉuraj regantoj kaj nobeloj prenis malsaman sintenon al gravaj eventoj. La lastaj praktikis kapitulacan politikon al fremdaj landoj kaj kondukis kruelan subpremado enlande. La manĉura popolo firme leviĝis al batalo kontraŭ fremdlanda invado por defendi la patrolandon kaj subteni revolucion kune kun la aliaj frataj naciecoj. La manĉuroj Baŭkun k.a. jam organizis armitan insurekcion kun revoluciuloj dum la Revolucio de 1911 kaj martiriĝis heroe.

En 1921 fondiĝis la Komunista Partio de Ĉinio. De tiam la manĉura popolo kaj aliaj naciecaj popoloj de la lando faris firman batalon por la revolucio sub la gvido de la Partio. Frue en aŭtuno de 1921, la manĉura laboristo Vang Ĝjun jam aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Dum la Striko de la Sepa de Februaro en 1923 li estis unu el la komitatoj de la Ĉanghindian-a Fervojista Sindikato. Poste eminentaj filoj de la manĉur-nacieco Guan Hiangjing

k.a. sinsekve aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Guan Hiangjing estis naskita en Ginhian-gubernio de Liaŭning-provinco, presisto en sia juneco, aliĝis al la Partio en 1925 kaj fariĝis membro de la centraj komitatoj elektitaj de la sesa kaj sepa kongresoj de la Partio. En la tempo de 1923 ĝis 1927, okazis pli ol 180 strikoj de diverslokaj fabrikoj kaj minejoj en la Nordoriento sub la gvido de la Partio, en tiuj strikoj partoprenis pli ol 200,000 manĉuraj laboristoj. Post la Evento de la 18-a de Septembro de 1931, respondante al la alvoko de la Partio la manĉuraj popolanoj partoprenis unuj post aliaj en la movado kontraŭ japanaj agresantoj kaj por savi la patrolandon kaj en la Nordorienta Kontraŭjapana Demokratia Unuiĝinta Armeo. En la periodo de la Liberiga Milito, respondante al la granda alvoko de la Komunista Partio de Ĉinio "Faligu Ĉiang Kajŝek kaj liberigu la tutan Ĉinion", la manĉuraj popolanoj konkure aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj faris grandan kontribuon por la milito.

Antaŭ la Liberiĝo, la kuomintanga reakciularo diskriminaciis kaj subpremis manĉur-naciecon, multaj manĉuroj sin alinomis kaj kaŝis sian naciecon. Post la Liberiĝo, sub la prilumado de la nacia politiko de la Partio, la manĉuroj ĝuas nacian egalrajton, fariĝis mastroj de la nova Ĉinio kaj ĝoje prenis al si la originajn nomon kaj naciecon. En 1952, la Centra Popola Registaro faris decidon, ke la ŝtato garantias la politikan rajton de nacia egaleco al ĉiuj nacimalplimulto logantaj dise en la diversaj lokoj. Ili havas siajn reprezentantojn en la diversnivelaĵaj ŝtataj organoj. Ekz: la manĉur-nacieco havis 18 reprezentantojn en la Unua Tutlanda Popola

Kongreso kaj certan nombron da reprezentantoj en la Unua Popola Kongreso de Liaŭning, Gilin, Pekino k.a. De tiam, la manĉur-nacieco havis konvenan nombron de siaj reprezentantoj en ĉiuj postaj popolaj kongresoj.

Post la Liberiĝo, precipe post la agrikultura kooperigo kaj popolkomunumigo, la agrikultura produkto de la manĉuroj havas grandan disvolviĝon kaj ilia vivo multe altiĝis. La manĉuroj laboras en ferŝtalaj, maŝinaj, karbaj, tekstilaj, trafikaj, komercaj kaj aliaj entreprenoj. En 1958 la nombro de manĉuraj laboristoj de Liaŭning-provinco pliiĝis sesoble kompare kun tiu de 1949.

Sub eduko de la Partio, precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio, la vasta amaso de manĉuraj laboristoj altigis sian ideologian kaj politikan konscion. Ili aktive partoprenas en socialisma revolucio kaj konstruado kaj diligente studas teknikon por la revolucio, inter ili aperis nemalmultaj teknikaj lertuloj. Subtenate kaj helpate de la Partio kaj amasoj, iu manĉura teknikisto de la Benhi-a Ferŝtala Kompanio kreis kaj renovigis pli ol 190 instrumentojn en pli ol dek jaroj. La manĉuraj kaj hanaj laboristoj de la Gilin-a Grasa Fabriko sukcese kreis sapobazan alttemperaturan lubrikaĵon kun internacia nivelo. La metiarto de la manĉur-nacieco atingis relative altan nivelon jam en King-dinastio. La manĉuraj metiartistoj estas lertaj en jada, nukso kaj frukto-kerna skulptado. Post la Liberiĝo la manĉuraj metiartaj mastroj de Pekino disvolvis la hereditan arton kaj kreis nemalmultajn metiartaĵojn bonvenigatajn en kaj ekster nia lando.





La ĉina klimato

ĈAR Ĉinio situas en la sudorienta parto de la Eŭropa-Azia Kontinento apud Pacifiko, la aparte rimarkinda karaktero de ĝia klimato estas la musonoj kaŭzitaj de la varmea diferenco inter la maro kaj kontinento. Kaj krome pro la vasteco kaj komplikeco de la formo de ĝia teritorio, troviĝas en ĝi pluraj tipoj de klimato kaj klimataj riĉfontoj utilaj al la agrikulturo.

MUSONOJ — KARAKTERIZAĴO DE NIA KLIMATO


Malsama estas la varm-enteno de kontinento kaj maro, kaj la varmeo de la unua ŝanĝiĝas pli rapide ol tiu de la lasta sub la influo de sama sunbrilo. Tial ne egalas la varmeo de la aero super kontinento kaj tiu super maro. En vintro, la aero kaj la aerpremo super kontinento estas pli malvarma kaj pli granda respektive ol tiuj super maro. La altprema aero nature fluas al loko kun malpli alta aerpremo, same kiel fluanta akvo. Tio estas ĝuste la kaŭzo, kial en vintro la aero fluas de Siberio de USSR kaj la Mongola Popola Respubliko al la sudaj maroj de Ĉinio kaj la ventoj en la tuta lando blovas sudokcidenten aŭ sudorienten. En somero, la aero kaj la aerpremo super kontinento estas pli varma kaj pli granda respektive ol tiuj super maro, sekve la humida aero super la maro fluas al la kontinento. Tial somere en Ĉinio abundas aerfluo de super Pacifiko en sudoriento kaj la Hinda Oceano en sudokcidento. En la plejparto de nia lando tiam blovas nordokcidenten aŭ nordorienten la ventoj.


La vintra musono formiĝas en internejo de Azio kun alta latitudo. Tie la varmo disradiata de la suno en vintro estas tre malforta, la noktoj estas longaj dum kiuj multe da varmo perdiĝas kaj sekve la aero fariĝas tre malvarma. Kiam tia aero akumuligigas ĝis certa kvanto, ĝi eksplodas kaj blovas muĝante suden portante akran froston al la atingitaj lokoj kaj tio estas la t.n. frosta ondo. En ĉiu vintro aperas 5 aŭ 6 fortaj frostaj ondoj. Tial en vintro la plejparto de Ĉinio havas frostan

kaj sekan klimaton kaj nia lando estas relative malvarma kompare kun tiuj de la sama latitudo.

En somero, blovas sudorienta kaj sudokcidenta musonoj. La sudorienta musono devenas de Pacifiko kaj influas ĉefe la orientan parton de nia lando. La sudokcidenta musono devenas de la Bengala Golfo kaj la Hinda Oceano kaj influas ĉefe la sudokcidentan kaj sudan partojn de Ĉinio. La somera musono trapasas vastan oceanon kaj alportas abundan pluvakvon al la ĉina kontinento, kaj pro tio la jara pluvokvanto de la plejparto de


Riĉa rikolto de bananoj de Hiŝuangbanna de Junnan-provinco





Pluvoza sezono de Ĉinio

- 1 Pluvoza regiono en somero kaj aŭtuno (jun-sept).
- 2 Pluvoza regiono en somero (julio-aŭgusto)
- 3 Pluvoza regiono kun malklara ĉielo en printempo kaj vintro
- 4 Pluvozaj regionoj en duonjaro (4a: majo-septembro, 4b: majo-oktobro)
- 5 Pluvoza regiono en somero (junio-aŭgusto)
- 6 Seka regiono en la tuta jaro (jara pluvkvanto estas malpli ol 200 milimetroj)



Kvar sezonoj de Ĉinio

- 1 Longa vintro sen somero, aŭtuno tuj post printempo
- 2 Kvar sezonoj klare dividitaj kun frosta vintro kaj varmega somero
- 3 Vintro tra la tuta jaro
- 4 Printempo en kvar sezonoj
- 5 Longa somero en vintro, printempo tuj post aŭtuno
- 6 Somero tra la tuta jaro

Ĉinio koncentriĝas en la someraj monatoj kaj faris la sudorienton de Ĉinio regiono kun relative granda pluvakva kvanto de la sama latitudo sur nia terглоbo.

La alvena tempo de pluvo kaj la inunda aŭ sekega sezono de diversaj lokoj de nia lando ĝenerale estas kaŭzita de la veno kaj paso de musonoj. Se foje aperas musono neregula, tiam nepre okazas relative granda inundo aŭ sekegeco.

DIVERSAJ SPECOJ DE KLIMATO

Mohe-regiono de Hejlonggiang-provinco de nord-orienta Ĉinio situas norde de 53 gradoj de la norda latitudo en la malvarma varmzono; dum Zengmu-anŝa ĉe la suda ekstremo de nia lando kuŝas je 4 gradoj de la norda latitudo en la ekvatora klimato. Inter la nomitaj lokoj estas granda distanco kaj ankaŭ granda diferenco en temperaturo de la atmosfero.

En la vasta teritorio de nia lando troviĝas multaj gigantaj montoj kun alteco de 7,000 ĝis 8,000 metroj super la mara nivelo kaj ankaŭ malaltejoj je pli ol cent metroj sub la mara nivelo, senlimaj ebenejoj kaj montregionoj en vasta areo kun kom-

plikaj terformoj kaj variaj klimatoj. Ekzemple Kinling-montaro, Nanling-montaro kaj multaj aliaj orienten-iraj montaroj baras la malvarman aerfluan en la nordo, tiel ke la vintro sude de la montaroj estas relative varmaj; Himalajo kaj la sudokcidenten-iraj montaroj Ĉangbaj, Granda Hing-an kaj Tajhang baras la varman someran musonon penetri en la internan landon, tiel ke la plejparto de pluvakvo falas sur la kontraŭventajn deklivojn, dum sur la dorsa flanko falas nur tre malmulte da pluvo.

La temperaturo de diversaj lokoj de Ĉinio estas tre diferenca en la kvar sezonoj. En vintro, norda Ĉinio estas kovrata de neĝo kaj glacio kaj la vintro de Hejlonggiang en la norda ekstremo de nia lando longas je pli ol 7 monatoj, dum en nia sudo la provincoj Guangdong kaj Junnan kaj la Aŭtonoma Regiono de Guangxi ĉiam plenas je verdaj herboj kaj arboj en prospero, kaj en Hiŝuangbanna de Junnan kaj Hajnan-insulo de Guangdong ĉarmas pejzaĝoj de tropika zono kun kokosarbaroj. En la meza baseno de Jangzi-rivero, la kvar sezonoj estas klare distingeblaj. Sur la Altebenejo de Junnan kaj Gujĝou en la sudoriento estas nek frosta vintro nek varmega somero, sed en la Nordtibeta

Altebenejo je pli ol 4,000 metroj super la mara nivelo neĝado okazas en ĉiu periodo de la tuta jaro. Tre malsama estas la jara pluvokvanto de diversaj lokoj de nia lando: en la sudorienta parto ĝi atingas 1,000-2,000 milimetrojn kaj la meznombra jara pluvokvanto de la plej pluvoriĉa loko Huoŝaŭliaŭ en la nordorienta parto de Tajvan-provinco estas 6,000 milimetroj; en la internaj lokoj de nordokcidenta Ĉinio ĝi ĝenerale estas malpli ol 100-200 milimetroj kaj iuj lokoj estas eĉ tute senpluvaj dum la tuta jaro, kaj la plantaĵoj devas esti

irigaciataj per akvo de degelinta neĝo sur monto kaj alkondukata tra subteraj kanaloj. Koncerne al la pluva kaj sekeca sezonoj, la meza kaj malsupra baseno de Jangzi-rivero estas pluvoza en printempo kaj sekega en somero, dum norda, nordorienta kaj sudokcidenta partoj de Ĉinio estas sekegaj en printempo kaj pluvozaj en somero. En la Nordokcidento la vetero ĝenerale estas serena, dum en Siĉuan kaj Gujĝoŭ troviĝas lokoj kun longdaŭraj pluvoj.

ABUNDA KLIMATA RIĈFONTO


La kontinenteca klimato de Ĉinio karakterizata per frosta vintro kaj varma somero ebligas al la plejparto de la lando kun relative alta temperaturo en somero kulturi altproduktajn kotonajn kaj grenajn plantojn, kiuj ŝatas varman veteron. Kaj pro tio ke la somero estas kaj varmega kaj pluvoza, la rapide kreskantaj plantaĵoj povas ricevi sufiĉe da akvo.

En la Nordokcidento, la klimato estas seka, tamen se nur oni havas akvon, alta temperaturo kaj abunda sunlumo povas fariĝi riĉfonto por agrikulturo kaj estas tre favoraj al la kreskado de plantaĵoj. En tiu regiono ne nur la pohektara produktokvanto de greno kaj kotonono estas alta, sed ankaŭ la kvalito estas bona. La melonoj kaj fruktoj produktitaj en tiu loko estas sukerozaj kaj bongustaj. Ekzemple Hami-aj melonoj de Ŝanŝan de Hingiang kaj sensemaj vinberoj de Turfan ĉiuj estas abunde produktitaj en seka klimato.

Pro varieco de la klimatoj de nia lando, ni havas abundegan riĉfonton de diversaj animaloj kaj vegetaloj kaj nombregon da kuracherboj. En nia lando estas kultureblaj kotonono, sojfabo, arakido, kolzo, beto, sukerkano, kaŭĉukarbo, kafo, olepalmo, agavo, kokao, pipro ktp, kiuj estas bonaj kondiĉoj por la socialisma konstruado kaj kontentigo al la bezono de nia popolo.

Por mastri la leĝon de la ŝanĝiĝo de la klimato, plene utiligi la bonajn kondiĉojn alportitajn de la klimato, venki la malfacilojn kaj difektojn alportitajn de ĝi kaj disvolvi nian produktadon kaj konstrui nian landon, ne nur la Centra Meteologia Stacio sed ankaŭ tiuj de la provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj publikigas veterinformojn por unu, tri aŭ kvin tagoj kaj eĉ por pli longaj periodoj, sed ankaŭ tiuj de la gubernioj donas meteoantaŭdirojn laŭ la konkretaj lokaj kondiĉoj konsultante tiujn informojn por bone servi al la agrikultura produktado.

Arbaro de Hejlonggiang-provinco en vintro



Ĵus aperis:

Parolado de Kiaŭ Guanhua, Estro de la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko, ĉe la Plena Kunveno de la 28-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj

24p. 13 x 18.5 cm.


£ 0.04 US dol. 0.10 FF. 0.50 DM. 0.40
Yen 40 Gld. 0.40 Din. 0.80 K.Pes. 2.50

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuanto: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Mendebla ankaŭ ĉe niaj perantoj en diversaj landoj



Kurantaj Aferoj

**RAPIDA DISVOLVIĜO DE MALPEZA
INDUSTRIO EN GILIN**

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio la rapida disvolviĝo de la malpeza industrio de Gilin-provinco ŝanĝis la antaŭan staton, ke produktaĵoj de la malpeza industrio bezonataj de la provinco ĉefe dependis de liverado de Ŝanhajo, Tiangin kaj aliaj urbegoj. Laŭ la statistiko, de 1970 ĝis 1973, la totala produkt valoro de malpeza industrio de Gilin meznombro kreskis je pli ol 30% ĉiujare.

Nun la tuta provinco jam havas pli ol 4,000 grandaj kaj malgrandaj malpezindustriaj entreprenoj, kiuj multe levis memprovizan povon de la provinco per siaj produktaĵoj. Pli ol 40 specoj de la produktaĵoj kiel maŝinfabrika papero, sukero, emajlaĵoj k.a. jam povas kontentigi la bezonon de la provinco. Ankaŭ aliaj dekkelkaj specoj de produktaĵoj kiel bicikloj, kudromaŝinoj, kemiaj fibroj k.a. grandskale plimultiĝis. En la lastaj jaroj oni ankaŭ sukcesis provprodukti multajn novajn varojn antaŭe tie neprodukteblajn. Krom tio, pli ol 80 specoj de malpezaj industriaĵoj estas eksportataj, ekzemple maŝinfabrika papero, vino, ladmanĝaĵoj, tapiŝoj, brodaĵoj, ŝtongravuraĵoj kaj tablotenisaj pilkoj.

Sur la kovrilo:

Komercaj laborantoj gratulas la aktorojn de *La Butiko Hiangjang* pro ilia sukcesa prezentado.

Sur la dorskovrilo:

Floranta printempo



EL POPOLA ĈINIO 中國新道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (190) 1974

Ĉefa Enhavo

Pompe floras la socialismaj literaturo kaj arto	1
Reviviĝo de la ĉina pekina opero	4
Propaganda taĉmento sur stepo	11
Rakonta filmo "Fajraj Jaroj"	14
La esenco de la skribaĵo de Lin Biaŭ "sinregi por restarigi la etiketon"	18
Persisti en revolucio, oponi kontraŭ restaŭro	23
La 33-a familio	27
Tutkore servi al la konsumantoj	32
Kiel mi pasigas miajn lastajn jarojn	35
Raporto pri riĉa rikolto al amikoj	37
Postdorse de la tiel nomata "energia krizo"	42
La manĉuroj	46
La ĉina klimato	48


Ljuda—industria urbo ĉe marbordo

La urbo Ljuda (Ljuŝun-Dalian) sin trovas en la suda parto de Liaŭdong-duoninsulo. Ĝi estas unu el la bonaj havenoj de Ĉinio kaj ankaŭ bela marborda industria urbo.

Antaŭ la Liberiĝo, Ljuda estis haveno uzata de imperiistoj por rabado de ĉinaj riĉfontoj kaj dumpingo de iliaj varoj. La laborantaj popolanoj vivis tre mizere. Post la Liberiĝo, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolo de Ljuda diligente entreprenas industrian konstruadon, sin apogante sur la propraj fortoj kaj peneme luktante kontraŭ malfaciloj, kaj turnis Ljuda en la urbon kun industrioj de maŝinfabrikado, fero kaj ŝtalo, elektrono, kemio kaj tekstilado. Ankaŭ la vivo de la laboranta popolo multe pliboniĝis.


Marborda laborista sanatorio de Ljuda





Ŝipfarejo en nokto



La Dalian-a Haveno estas unu el la gravaj ĉinaj havenoj por ekstera komerco.






Ljuda konstruis sian elektronan industrion. Jen laboristoj de la Dalian-a Fabriko de Elektronaj Instrumentoj muntas detektilojn de fiŝaro.

La Dalian-a Industria Vagona Fabriko estas unu el la ĉinaj fabrikoj, kiuj produktas grandajn ekipaĵojn kaj vagonojn uzatajn en minejoj kaj metalurgiaj entreprenoj.





La Dalian-a Levmaŝina Fabriko produktas, krom grandaj levmaŝinoj, ankaŭ ŝtalajn spiralajn tubojn por la petrolo industrio de nia lando.



La Dalian-a Vitra Fabriko produktas pli ol 3,000 specojn de vitraj vazoj kaj metiartaĵoj. Jen laboristoj faras metiartaĵojn.

*Bambuaĵ plektitaj
metiartaĵoj*

